HUNGARA VIVO

6
1986
16,-Ft

Pri programoj por via libera tempo, pri enlandaj ripozebloj, pri kulturaj eventoj informas Vin

Turisma Informservo TOURINFORM per la telefonnumero 179-800, aŭ persone en la Oficejo TOURINFORM (Budapest, V., Petőfi Sándor u. 17/19./

TOURINFORM:

INFORMOJ PRI MULTAJ LOKOJ EN UNU LOKO

- Reguloj pri dogano, devizoj, pasporto, vizoj; limtrapasejoj
- Adreso kaj telefonnumeroj de vojaĝagentejoj, turismaj oficejoj, hotelaj kaj restoraciaj entreprenoj
- Restoracioj, trinkejoj, amuzejoj
- Muzeoj, artmemorajoj, naturprotektaj teritorioj
- Kuracbanejoj, plaĝoj
- Vojaĝoj per fervojo, sur ŝoseo, en aero
- Speciala meteorologia servo
- Poŝtaj servoj

		Per telefono	Persone
En la lingvoj hungara,	labortage	7-21 h	8-20 h
germana, angla,	sabate	7-20 h	8-20 h
rusa kaj franca	dimanĉe	8-13 h	8-13 h

Felelős szerkesztő: Benczik Vilmos. Kiadja a Magyar Eszperantó Szövetség. Felelős kiadó: Princz Oszkár, Készült a Magyar Eszperantó Szövetség nyomdájában. Felelős vezető: Varjassy Ágnes, Munkaszám: 86-0035. Terjeszti a Magyar Posta. Előfizethető bármely hírlapkézbesítő postahivatalnál, a Posta hírlapüzleteiben és a Posta Központi Hírlap Irodánál (KHI) Budapest V. József nádor tér 1. 1900, közvetlenül vagy postautalványon, valamint átutalással a KHI 215-96162 pénzforgalmi jelzőszámra. Előfizetési díj 1 évre 96,- Ft, fél évre 48,- Ft (külföldi címre 114,- ill. 57,- Ft). Egyes szám ára 16,- Ft. Megjelenik kéthavonta.

ENHAVO

Dialogo — por la bono de la homaro 202
Ĉingiz Ajtmatov pri lingvoj kaj kulturoj (*O.H.*) 203
Poemoj de Bertram Potts 205
Moldova, György: Straznicz-ky, la hungara patro (*Sándor Szathmári*) 206
Săulescu, Mihail: Eterneco (*Imre Szabó*) 208
Esperantaj libroj el Hungario 209
Originala poezio 215
Nedelĉeva, Nevena: La blankaj floroj 216
Kvina Internacia Literatura Forumo 219
Panoramo 220
Fenyvesi, Ervin: 223
Štimec, Spomenka: Sentitole 226
József Attila: Vi faris min infano (*István Ertl*) 227
Bodorkós, György: Novaj teknologioj en metalurgia fabriko 2. (*Ervin Fenyvesi*) 232
Miyamoto Masao: Omaĝe al Majo 232
Hofmannstahl, Hugo von: Balado de l' ekstera vivo (*István Ertl*) 233
Eminescu, Mihai: Nokton bonan (*Imre Szabó*) 233
Densusianu, Ovid: Sur la kampovojo (*Imre Szabó*) 233
Ĵuravlov, Aleksej Borisoviĉ: Sonetkrono 234
Recenzoj 236
Fenyvesi, Ervin: Gaja paĝo 238
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 239
Desegnaĵoj de Jenő Dallos 240

Sur la frontpaĝo foto de Z. Fejér

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf.193. H-1368
Aperas dumonate
XXVIa jaro 1986 n-ro 6
(130)
MESz nyomda 86-0125

Libroj ĉefrolas...

Tiu katalogo kompreneble forrabas iom da spaco, tamen restis loko ankaŭ por aliaj kontribuaĵoj. Dum en nia antaŭa numero ricevis plian emfazon publicistikaĵoj, nun tion havas literaturo.

Ni publikigas satiran novelon de György *Moldova* en la traduko de — Sándor *Szathmári*! La Esperantan poezion reprezentas interalie la porinfanaj poemoj de Bertram *Potts*, kiujn legos ĝue tute certe ne nur infanoj...

Meritas apartan atenton la *Sonetkrono* de juna soveta esperantisto, kiu profesie estas laboristo en kombajna fabriko — oni miras, kiel elstare li regas la ekstreme malfacilan formon.

El la ĵus aperinta novelaro „Dum nokta deĵoro" de Nevena *Nedelĉeva* ni elektis por prezento la emocian novelon *La blankaj floroj*.

Kun aparta ĝojo ni aperigas fragmenton el ankoraŭ sentitola pli longa prozverko de Spomenka *Štimec*, kiu per sia trie impresa libro „Ombroj sur interna pejzaĝo" certigis por si lokon inter la plej bonaj Esperantaj prozistoj. Ŝia homproksima, tre konkreta, tamen poezie saturita kaj neimiteble originala stilo trovos multajn ŝatantojn. Ni deziras por ni pluajn kontribuaĵojn el ŝia plumo... Amen.
en tiu ĉi numero, kiel decas en decembro. Jam de sur la frontpaĝo salutas Vin kelkaj novaj eldonaĵoj de Hungara Esperanto-Asocio, kiu ĉijare aperigis rekorde multajn titolojn. Kiel foje-foje ni faris tion jam ankaŭ pli frue, ni aperigas en tiu ĉi numero „mini-katalogon" de la eldonaĵoj de HEA, kun la nekaŝita intenco veki Vian apetiton pri ili.

Dialogo - por la bono de la homaro

Komence de oktobro okazis interesa simpozio en Budapeŝto — ĝin organizis la Filozofia Instituto de la Hungara Akademio de Sciencoj kaj la Roma Papa Universitato „Gregorio". En la simpozio partoprenis marksistaj scienculoj kaj katolikaj teologoj de dek tri socialismaj kaj kapitalismaj landoj.

Tiu ĉi simpozio — kvankam ĝi estis scienca kunveno — havis tre gravan politikan signifon. Ja kio okazis? Kunsidis por interŝanĝi ideojn la reprezentantoj de la du plej influaj, inter si antagonisme kontraŭstarantaj ideologioj de la nuntempa mondo. Oni bone scias, ke la rilatoj inter marksistoj kaj kredantoj ne ĉiam estis sennubaj. La eklezioj — inter ili la katolika — dum longaj jarcentoj profunde integriĝis en la ekspluataj klasoj de la klasaj socioj, kaj sekve ili ne akceptis aklame la aperon de la socialisma socisistemo sur la terglobo. Dum longa tempo ili nomis la socialismon „imperio de la malbono", „honto de nia epoko".

Ankaŭ marksistoj ne ĉiam tiel rilatis al la eklezioj kaj al la religio ĝenerale, kiel tion postulus la politikaj realaĵoj. Ili erare prognozis, ke la religioj „tre rapide formortos", kaj ili eĉ klopodis „rapidigi" tiun formorton per administraj limigoj de la eklezia kaj religia agado, ignorante la bazan tezon, ke kontraŭ ideologioj eblas lukti per ideologiaj, ne administraj rimedoj.

Sed la tempo konvinkis ambaŭ flankojn pri la malutileco de senpacienco unu kontraŭ la alia. Por marksistoj fariĝis evidentaĵo, ke signifa parto de la loĝantaro ankaŭ en la socialisma socio konservas sian religian kredon, kaj aliflanke, la eklezioj devis akcepti la fakton, ke ili devas labori en multaj landoj inter la kondiĉoj de la socialisma sociordo. Oni devas memorigi ĉi tie ankaŭ pri la socie pozitivaj tendencoj, naskiĝintaj enkadre de la katolika eklezio, interalie pri la t.n. „teologio de liberigo".

La politikaj realaĵoj kondukis la reprezentantojn de marksistoj kaj kredantoj al tiu ĉi simpozio: tio implicas la fakton, ke ili ne provis „interpacigi" la du ideologiojn. La celo de la simpozio estis serĉi la eblojn de aktuala, konkreta komuna agado.

Ambaŭ ideologioj estas profunde interesitaj en la adekvata solvado de pluraj tutglobaj problemoj, kiel la protektado de la homa medio, la luktado kontraŭ la krimado, alkoholismo, malstabiliĝo de la familia vivo en multaj landoj, la protektado de la junularo kontraŭ drogoj, morala trolibereco ktp.

La terenoj por la komuna agado abundas, kaj tiu komuna agado fakte jam estas realaĵo en multaj landoj. Plene evidentas, ke tio ne eblas sen reciproka komprenemo kaj toleremo, kiuj ne ekskludas la firman fidelecon al la propraj ideologiaj principoj.

En Budapeŝto okazis *ideologia* konferenco, de kiu oni ne atendu tujajn konkretajn, politikajn rezultojn. Sed ĝuste la fakto, ke kunvenis ideologoj, plej elokvente pruvas, ke la praktika kunagado de la sekvantoj de la du ideologioj ne estas momenta taktikaĵo; ĝi havas perspektivon vastan — por la bono de la homoj.

Eduard Huber, profesoro de la Papa Universitato Gregorio, kaj László Paskai, hungara ĉefepiskopo konversacias en paŭzo de la simpozio

Ĉingiz Ajtmatov pri lingvoj kaj kulturoj

Ĉingiz Ajtmatov, la mondfama sovet-kirgiza verkisto donis intervjuon al la revuo *Literaturnaja Gazeta* (Literatura Gazeto), eldonata en Moskvo. La intervjuo aperis la 13an de aŭgusto 1986.

De la intervjuanto ni ekscias, ke Ajtmatov ne parolis en la tiam finiĝinta 8a Kongreso de la Sovetaj Verkistoj, ĉar pro diversaj kaŭzoj li nehavis tempon por prepari tion. Je la demando de la ĵurnalisto, kion li estus dirinta, se li alparolus, li diris:

Bedaŭrinde pro kaŭzoj sendependaj de mi, nun mi ne havis tempon por min prepari. Sed se mi alparolus, unuavice mi parolus pri la problemo de nacioj kaj naciecoj, pri la interefiko de la kulturoj, literaturoj, lingvoj. Tiuj demandoj por mi estas vivgravaj, ĉar nia lando estas unio-sistema, kun multaj nacioj, kaj tio, kio okazas en la unuopaj respublikoj, necese havas ĝeneralan gravecon. Eblas, ke ni ne ĉiam pensas pri tio. Tamen estas precize tiel. Kaj de tio, kiel evoluas la lokaj naciaj literaturoj, kiom modernaj kaj aktualaj estas la taskoj, kiujn ili solvas sur siaj naciaj grundoj, kaj samtempe en la ĝenerala kunteksto de la socialista vivmaniero, unueca por ni ĉiuj, de tio dependas grandparte la publikviva, morala, spirita plenumkapablo de la homo — t.e. kion la homo portas en si por sia propra socio kaj la mondo: harmonion aŭ malharmonion de kontaktoj, patriotismon, emon honori la naciajn valorojn de aliaj, aŭ male, fieregon, indiferentecon kontraŭ aliaj, parolantaj aliajn lingvojn.

Ĉi tiuj ne estas akademiaj demandoj, sed la plej esencaj, plej ĉiutagaj kaj ĝuste pro tio neprokrasteblaj demandoj. Kaj en ĉi tio ni neprege bezonas ankaŭ pulikecon kiel signon de la nova pensmaniero. Flegado de la publikeco — jen estas la ordono de nia epoko.

Mi jam parolis pri ĉi tio en la kirgiza partia kongreso, kaj nun mi deziras ripeti: ni devas liberiĝi disde la malnovaj mezuretadoj kaj komparadoj, ni devas definitive forĵeti ties katenojn. Kiam ni parolas pri la stato de la naciaj kulturoj, ĉiam ni kutimas menciadi, ke iam ni estis nekleraj, analfabetaj, kaj senfine ni citas ĉi tiujn faktojn, kiam ni klarigas la hodiaŭan realon. Kvazaŭ ankoraŭ ĉiam ni vivus en la epoko de la kampanjo por la likvido de la analfabetismo, de la ruĝaj kaj nigraj tabuloj. Tamen ĉi tiuj tabuloj apartenas jam delone al la pasinteco, kaj hodiaŭ ili ne povas servi kiel startpunkto. Hodiaŭ ni ne devas kompari, ni diru, nian industrion kaj ĝenerale nian ekonomion al tiu de la jaro 1913. Ĉi tiu malsaĝaĵo konduskas al nenio — ĉe la pordo frapegas jam epoko nova, tiu de la teknika-scienca revolucio. Ankaŭ por la prijuĝo de la evoluado de la naciaj literaturoj oni devas apliki alian mezurilon: hodiaŭ ni ne rajtas ĝojegi vidante ke ĉiuj kapablas skribi kaj legi, ke estas gazetoj, estas radio, estas televido, teatro kaj tiel plu. Ĉio ĉi estas tiel, kaj estas bone, ke estas tiel. Sed per tio ni ne povas forfermiĝi de la nove aperantaj, vivaj problemoj de la vivanta, aganta popolo kaj ties kulturo. Se mi alparolus en la kongreso, tiam mi estus dirinta al miaj amikoj-literaturistoj, precipe al la publicistoj kaj kritikistoj: oni ne devas vidigi la aferojn tiel, kvazaŭ en niaj naciaj sferoj ĉio estus solvita, kaj ne estus problemoj. Oni devas ne ĉiame ripetadi ĉi tiujn elementojn, faktojn: pensadi — hodiaŭ tio signifas ion alian. Signifas la trapensadon de tio, kiom profunde kaj demokratie evoluas la nacia kulturo, la nacia konscio en la sistemo de nia internaciisma strukturo. La internaciismo ne estas aritmetiko, ne estas fina sumo de sumigendoj, sed la plej alta matematiko de naciaj kulturoj vivantaj siajn proprajn memstarecojn. Kaj samtempe ĉi tiu viva donitaĵo estas neimagebla sen la komuna ecida denominatoro , karakteriza pri la tuto de nia spirita

vivo, sen la aktiva aplikado de la grandaj atingaĵoj de la pli alte evoluintaj kulturoj. Estas ĉi tio, pri kio estas inde ke ni parolu, en tiuj aferoj ni devas provi orientiĝi.

Estas ĉi tie ekzemple la evoluo de la nacia literatura lingvo. Kio okazas en ĝi, kiaj procezoj disvolviĝas? Ni konsideru la pruntepreno jn — kiom naturaj, organaj, aktualaj ili estas, ĉu ne la konservativismo de la pensado, la maldiligento de intelekto kaŭzas, kiam mekanike, foje por flatado, oni transprenas iun aŭ alian vorton el unu lingvo en la alian?

Tuj mi deziras fiksi: estas tute konate, ke la rusa lingvo estas granda lingvo, kaj paroli hodiaŭ pri la rolo, kiun la rusa signifas por ĉiuj naciaj kulturoj de la lando, ekvivalentas frapegadon sur malfermitaj pordegoj. La rusa lingvo estas granda lingvo, sed tio ne signifas, ke ne necesas atenti la internajn leĝojn de iu alia nacia lingvo, kaj ke oni devas transpreni en la koncernan nacian lingvon — parte ankaŭ el la rusa — tion, kio ne estas bezonata. Ĉi-rilate estas stranga fakto la titolo de du kirgizlingvaj lokaj gazetoj. Unu estas nomata *Isik-Kol pravdasi*, la alia *Narin pravdasi*. (*Pravda* ruse=vero). Tio nin profunde ofendas. Kia popolo estas, kun miljara historio post si, el kies lingvo mankas la vorto „vero"? Al kiu servas tia kripligo de la rusa lingvo kaj tia subtaksado de la kirgiza, en kiu la koncepto „vero" havas ĉ. dekduon da sinonimoj?! La evoluo de la nacia literaturo, kreadu en ĝi verkistoj kiom ajn talentaj, estas ligita al tuta vico de aliaj faktoj — al la ĝenerala kulturiteco, klerigiteco de la polo. En la kirgiza ĉefurbo Frunze ne plimultiĝas la nombro de la kirgizaj lernejoj, kvankam lernejoj konstruiĝas centope. Delonge maturiĝis la tempo por tio, ke en la ĉefurbo de la respubliko oni malfermu kirgizajn infanĝardenojn. Neniu malhelpas tion, sed same neniu faras ion por tio, kvankam ĉio ĉi, inter la nunaj cirkonstancoj, fariĝas vivgrava por la popolo. Kiaspeca nacia kulturo estas tiu, kiu ne havas sian propran bazon?

Sed kiam tiaj doloraj pensoj esprimiĝas, tuj aperas homoj, kiuj interpretas tion kiel manifestiĝon de naciismo, de malvasthorizonteco. Bedaŭrinde, ĉi tiu antaŭpuŝiĝema supervigleco, kiu fontas ne malgrandparte el karierismo, ne renkontas sufiĉe grandan kondamnon. Konekse kun tio estas necese rimarki, ke finfine estas ĉi tiu tendenco, kiu naskis province tiun specialan tipon de demagogo, kiu faras preskaŭ prestiĝprofesie la laŭdegadon de la rusa lingvo, kaŭze kaj senkaŭze, kaj la subtaksadon de sia propra.

La subtaksado de la propra nacia lingvo, de la nacia propreco estas unu el la ekstremoj, sed ekzistas ankaŭ alia, al ĉi tiu kontraŭa, kiu same estas indigniga. Mi parolas pri tiu tendenco, kiu volas vidi sian propran popolon nur sur la glortabulo, volas konsideri nur ĝiajn bonajn proprajĵojn, pozitivajĵojn, kaj ne deziras rimarkiĝiajn negativajĵojn. Komprenebla, klarigebla deziro estas tiu ĉi, sed kontraŭdialektika, kaj certas grade ĝi estas bremso sur la vojo de la renoviĝo.

Kiam ni teorie supozas, ke posttempe, en ia fora estonteco ĉiuj lingvoj kunfandiĝos, kaj nur unu aŭ du lingvoj estos en la mondo, prisorĉite de ĉi tiu perspektivo apenaŭ — se entute — ni kalkulas tion, ke ĉimaniere la mondo estos pli malriĉa. La „venkintaj" lingvoj ne havos provizan medion. La unuspececo ne povas helpi la evoluon. Pro ĉi tio estas grave konservi kiel eble plej longe la lingvan diversecon. En nia epoko de la informeksplodo, kiam kreiĝis rilatoj ĉiujn kaj ĉion samniveligantaj, la lingva izoliteco utilas al neniu. Mi tamen estas por la multeco de la literaturaj lingvoj, kaj por tio, ke ĉi tiuj lingvoj havu daŭran eblecon por ekzisti kaj evolui.

La senmorteco de la popolo troviĝas en ĝia lingvo, ĉiu lingvo estas granda por la propra popolo. Ni ĉiuj havas filan devon antaŭ la popolo, el kiu ni naskiĝis kaj kiu donis al ni sian plej grandan trezoron — sian propran lingvon: ke ni gardu ĝian purecon, multobligu ĝiajn valorojn.

Nuntempe tamen ni renkontas la novan dialektikon de la historio. La moderna homa socio estas en konstanta kaj konstante kreskanta kontaktiĝo, kiu pli kaj pli fariĝas

Poemoj de Bertram Potts

Bertram Potts: La pingveno

Mi renkontis la pingvenon sur la strato
kun la vestoj en plorinde kota stato.
Ĝi rigardis nur antaŭen
fiksokule, ne ĉirkaŭen,
kaj mi trovis ĝin objekto de kompato.

Siajn paŝojn ĝi irlace peze pelis
kaj fizike afliktiĝis kaj anhelis;
mi proponis hejm-inviton,
manĝoservon, gasto-liton –
mia peto ĝian celon ne ŝancelis.

Ĝi rektigis sin kaj min atentis mire,
kaj aspektis vere morne, eĉ martire.
Kvankam febla kaj fal-preta
kun mieno ja asketa
ĝi respondis al mi firme, sed suspire:

„Mi dankas vin pro la bonvenigaj vortoj
pri gastama hejmo, dormo, kaj komfortoj,
sed en fora konferenco
en la nomo de scienco
mi prezentos antarktikon per raportoj! "

Malgraŭ ke ĝi kompatinde tre mizeris,
en la koro kaj sinteno ĝi fieris,
kaj kun paŝoj senhezitaj
kaj motivoj alt-meritaj
ĝi finfine en la foro malaperis.

Bertram Potts: La simio ĉe la opero

Mi renkontis simion – surpriza afero –
li kunsidis najbare ĉe Wagner-opero.
Mi rimarkis, ke kvankam li multe sin movis,
la scenejon observi li tute ne povis.

Mi eksentis kompaton kaj flustris bonfare:
„Mi tre volas vin helpi, por vidi pli klare.
Do, bonvolu pardoni min – por via ĝuo
mi proponas sidlokon sur mia genuo! "

Li timeme kapklinis kaj montris kontenton,
sed malgraŭ plezuro ne faris komenton.
Mi lin levis respekte – li *ne* estis peza,
ĉar feliĉe li estis de kresko nur meza.

Li absorbe atentis la kantojn kaj scenojn,
kaj plenĝuis la dramon, la irojn kaj venojn.
Kurtenfale mi tuj lin demetis ĝentile,
kaj kortuŝe li staris kaj tre larmobrile

riverencis, kaj time etendis la manon,
kaj transdonis al mi dankesprime bananon.
Mi komencis lin danki – sed „Ne, ne" li gestis,
kaj burĝone ridetis kaj vigle forestis.

Bertram Potts: La burdo

Ĝi flugas fide inter floroj
bru-ĝue, iom drole –
bizara burdo kun deĵoroj
en ombro-donaj koridoroj
kaj serĉ-instigaj dolĉ-odoroj,
aktive kaj scivole,

senscie, ke post pruvo-celoj
mekanikistoj trovas
per testoj en la vent-tuneloj,
ciferoj, skizoj, kaj modeloj,
ke korpoj forme de bareloj
neniam flugi povas.

La burdo estas flug-uniko
sen doktoriĝa tezo,
nenion scias pri logiko,
nek pri necesa lev-tekniko,
kaj malgraŭ fenomena diko,
sin pafas for kun pezo.

Trankvila kaj facil-anime
en ĉiutaga rito
ĝi zumas flegme kaj pilgrime
al floraj koroj kis-intime
kaj ŝvele ŝarĝas sin sublime –
ne gravas la gravito.

ĉion envolvanta kultura vivbezono. Inter tiaj cirkonstancoj ĉiu homo devas koni plurajn lingvojn. En la literaturo de nia respubliko nuntempe ni spertas la fenomenon de la dulingveco. Cetere ankaŭ mi mem apartenas al la dulingvaj verkistoj. Kiel konate, skribas en sia gepatra kaj en la rusa lingvoj Vasil *Bikov*, Ion *Druce*, la du *Ibrahimbekov*, T. *Pulatov*... Mi konas multajn homojn kiuj eminente uzas plurajn lingvojn, lingvojn de nia patrujo kaj ankaŭ eksterlandajn. Antaŭ ili vaste malfermiĝas la giganta mondo de la kulturo. Mi estas certa, ke tio estas la vojo de la estonteco — ĉi tiun miraklan mondon oni devas larĝe malfermi antaŭ ĉiuj.

Surbaze de artikolo en „Népszabadság" tradukis: *O.H.*

Ĉi-vespere parolis Strazniczky, la helpaktoro:

En 1915, en la dua jaro de la mondmilito, mi aktoris ĉe malgranda provinca trupo. Vane ni alportis el Budapeŝto la patriotajn dramojn furorantajn kiel „La olda standardportisto", aŭ la „Virino kiel ĉefleŭtenanto", la publikon jam enuigis la militaj historioj. Nur malantaŭe troviĝis kelkaj spektantoj: en la antaŭaj dek seĝovicoj ni trankvile povus planti terpomojn; tio eĉ ne estus malutila al niaj maloftaj vespermanĝoj.

Do, imagu mian surprizon, kiam foje, ĝuste ĉe la prezentado de „La olda standardportisto" mi rimarkis altan, elegantan sinjoron, meze de la unua vico. Meze de mia granda monologo mi flustre demandis la sufloron: „Kiu ricevis senvilojn: blankajn lipharojn kaj rondan barbon. Mi iris al la stacidomo kaj faris mian debutan paroladon antaŭ la soldata trajno, kiu iris al Serbujo. Kia sukceso ĝi estis, karaj sinjoroj! Kiam mi parolis pri mia filo, kiun mi dorlotis sur mia brusto kaj tamen sendis al la batalkampo, defendi la patrujon kaj la reĝon kaj, se necesos, ankaŭ morti, — tiam eĉ mi mem kortuŝiĝis kaj — se mi vere havus filon, — mi vetas, ke mi mem pelintus lin al la batalkampo. La soldatoj ploris kaj entuziasme kantis: „Tremu, tremu, aĉa malamik'". Se ili tiam trovus tie serbon, mi ĵuras, ke ili nepre tramordus lian gorĝon.

Dum tri duonoj da jaro mi vivis kiel fiŝo en akvo. Antaŭ ĉiu tagmanĝo kaj vespermanĝo

György Moldova (1934-)

Strazniczky, la hungara patro

pagan bileton?" Sed li respondis, ke la sinjoro aĉetis tute laŭregulan bileton ĉe la kaso.

Al mi ŝajnis, ke la eleganta sinjoro spektas precipe mian propran rolludon. Jes, mi mem ludis la rolon de la maljuna standardportisto.

Post la finvortoj de mia granda monologo: „Kiu mi estas? — mi demandas. Mi estas hungara patro. Mi perdis mian filon, mi plu ne povas do nomi min patro. Sed mi restas hungaro, ĝis la momento de mia morto. Vivu la reĝo!" — la sinjoro kunfrapadis siajn blanka-gantajn manplatojn.

Post la prezentado oni frapetis sur la pordo de mia vestiĝejo. Enpaŝis la eleganta sinjoro. Li riverencis kaj transdonis al mi sian vizitkarton: „Doktoro Jozefo Mateides, urbestro."

— Per kio mi povas vin servi?

— Unue permesu, ke mi gratulu vin pro via teatra ludo. Vi trovis tre emociajn kor-tonojn por sentigi la dolorojn de patro. Ĉu vi vere havas infanojn?

— Ne, sinjoro urbestro. Espereble mi ne havas.

— Mirinde! Kiom vi salajras ĉi tie, ĉe la teatro?

— La enspezo de la deka seĝvico estas mia salajro, sinjoro urbestro.

— Tiu vico estas ĉiam preskaŭ malplena. Ĉu vi ne emus veni en la servon de la ŝtato?

— Pri kio temas?

La urbestro iom paŭzis kaj alrigardis min signifoplene.

— Vi devus esti la Hungara Patro.

Li klarigis mian taskon: mi devos survesti nacian kostumon, iri al la stacidomo kiel hungara patro, kies filo jam batalas sur la batalkampo. Mi instigos la soldatojn, kiuj vojaĝas al la fronto. Eble mi eĉ benos ilin.

Mi estis ĉe la rando de malsatmorto. Eĉ miaj lombardslipoj estis en lombardejo. Mi ne havis alian elekton. Mi devis alglui grizajn mi iris al la stacidomo, plorigis la soldattrajnojn, poste mi ŝtopis pufa mian stomakon. Poste mi jam devis teni dieton, ĉar mia korpo trodikiĝis, male al tio, ke hungara patro, kiu dum mil jaroj firme staris en la tempesto, de la Karpatoj ĝis la malsupra Danubo, povas esti nur malgrasa pro tiel granda klopodego.

Dank' al niaj idiotaj generaloj, kiuj malvenkus eĉ tiam, se ni tute ne havus malamikon, la efiko de miaj paroladoj pli kaj pli malkreskis. Mi jam plendis al sinjoro Mateides, ke mi kiel hungara patro ne povas venki sola la malamikon. En la aŭtuno de 1916 oni surĵetis min per la unua tomato, tuj poste per la unua putra kapsiko, kaj de tiam mi devis farigi la purigadon de mia nacia kostumo por kontraktita monatprezo. Sincerdire, apenaŭ mi povis nokte dormi. Neniam mi imagis min genia aktoro, sed dum mia tuta teatra kariero oni neniam ĵetis sur la scenejon kreskaĵon pli aĉan ol bulbo.

Miajn zorgojn feliĉe finis la malvenko.

Dum la komunismaj tempoj mi venis al Budapeŝto kaj ree dungiĝis ĉe malgranda teatra trupo. Mi salajris relative sufiĉe bone, sed neniam mi havis rolon pli grandan ol tri-kvar frazoj. Ofte mi rememoris pri mia malnova, granda rolo: la „Hungara Patro", kiam la soldata vagono dum duona horo salutis nur min, kaj, mi ne hontas konfesi: mi ploris tiel, ke en mia kuseno la plumoj gluiĝis je buletoj.

Vi povas imagi mian ĝojon, kiam, foje, sur la Rákóczi-strato, mi renkontis sinjoron urbestron Mateides. Mi intencis lin alparoli, sed mia iama mastro montris nenian interesiĝon, nur okule li signis al mi, ke mi lin sekvu. Je mia granda surprizo, li gvidis min al iu socialdemokratia partiejo. Li vokis min en ĉambron, ŝlosis la pordon, kaj kortuŝe sin turnis al mi.

— Karega sinjoro Strazniczky! Nia malnova entrepreno, kiu portis tiel multajn sukcesojn al

vi, kaj, mi ne neas, ankaŭ al mi en formo de ordenoj kaj premioj, — bedaŭrinde bankrotis. Sed mi ne povas imagi, ke la socialdemokratia partio ne povus bone uzi hungaran patron.

Sekvatage ni iris al iu estrarano de la partio, al kamarado Benjameno Wachsberger. Antente li aŭskultis mian programon, kaj ne ŝajnis malkontenta.

— La ideo — li diris — ne estas malbona. Niaj amasoj estas ankoraŭ infektitaj per la miasmo de la naciismo. Unu hungara patro — se ni racie lin utiligos — vere povus fari konsiderindan efikon. Sed la tuta rolo devas esti tralaborata.

— Jes. Eble tiel, ke mi havu du infanojn. Ambaŭ pereis en la milito. Pereu la reĝo!

— Kiu parolas nun pri reĝo? Li estas mortinta leono! Nun ni batalas ne kontraŭ li, sed kontraŭ la komunistoj. La ideo pri la mortintaj infanoj estas bona. Ni povas ĝin konservi kaj uzi, kun la modifo, ke ili defendis la interesojn de la laborista klaso kaj ilin mortigis la komunistoj.

La hungara patro-figuro transformiĝis ankaŭ laŭ eksteraĵo: anstataŭ nacia kostumo mi surprenis supertuton kaj laboristajn ŝuojn. Mi rajtis razi min nur en ĉiu tria tago, kaj ankaŭ tiam nur per uzita klingo, por ke miaj vangoj aspektu nerazitaj kaj anstataŭ la nacia himno, mi devis kanti: „En batalvicojn, socialistoj!"

Sed mia parolado kun jena komenco: „Mi, la simpla laboristo, la hungara patro, diras al vi, proletaj fratoj..." superis per sia efiko eĉ la oraciojn, kiuj instigis la soldatojn iri al la batalkampo. En la fabrikoj, kie mi oratoris, tuj plimultiĝis la anoj de la socialdemokrata partio, kaj ili ekskomunikis la komunistojn. Eble pro tio okazis, ke poste, kiam Béla Kun kaj la ceteraj komunistaj partiestroj elkarceriĝis, mi mem tuj enkarceriĝis en iun malpleniĝintan ĉelon, kaj nur Miklós Horthy, la blankĉevala ĉefarmeestro de la kontraŭrevolucio min liberigis.

Sinjoro Mateides atendis min ĉe la pordo de la malliberejo. En la butontruo li portis stiligitan aŭreolon kaj kortuŝite min akceptis.

— Kara sinjoro Strazniczky! Mi ĉiam sciis, ke nia granda ideo, la „Hungara Patro" naskiĝis sub feliĉa konstelacio. Simple neimagebla estas tia reĝimo, kiu ne povus ĝin utiligi. Mi salutas vin kun vera, hungara amo, je la nomo de la partiestraro. Jen la antaŭpago, prenu ĝin. Aĉetu tian nacian kostumon, kian vi portis dum la milito. Morgaŭ vi iros al tutlanda rondvojaĝo kiel hungara patro kaj ano de la Gloria-partio.

— Sed mi ne scias ja, kion mi devos diri!

— Tion saman, kiel antaŭe: ke la komunistoj mortigis viajn du filojn; tamen ne licas tiom skoldi la komunistojn, kiel dum via epoko de socialdemokrata hungara patro. Ni estas pli modera partio kaj kompreneble anstataŭ „En batalvicojn, socialistoj", vi devos fermi vian paroladon per „Veni creator spiritus".

De tiam ni efektivigis multajn komunajn aranĝojn. Estis mi, kiu ĉe la reakiro de Transilvanio, poste en la suda landparto kaj Slovakio transdonis kiel simpla hungara patro panon kaj salon al ĉefarmeestro Miklós Horthy. Poste mi rehavis la ĝojon, kaj mi denove povis instigi la soldatojn iri al la batalkampo, same kiel hungara patro. Kvankam — feliĉe — mi ne havis filon, mi sendis al la krucmilito kontraŭ la bolŝevikoj tri miajn filojn. Do, miaj filoj intertempe plimultiĝis, sed mi — justmodere — ne kalkulis alpagon pro la plimultiĝo.

Tiutempe la magazinoj kaj la filmĵurnalo min malkovris kaj starigis en la servon de la totala milita fortostreĉo. Apenaŭ pasis semajno, ke mi ne revidis min en iu ilustrita gazeto. „Hungara patro skribas leteron al sia soldata filo". „Hungara patro rikoltas anstataŭ sia filo".

La kompatinda sinjoro Mateides mortis jam dum la milito. La sieĝo, nomata liberiĝo, jam trovis min sola, sen li. Dum pluraj jaroj mi ne povis decidiĝi ie ajn provi ludi la rolon de hungara patro. Min dungis la „Vilaĝteatro" por ludi la rolon de hezitanta mezkamparano. En la fino de 1949 mi ricevis alvokon de la Ŝtata Demagogia Oficejo. Mi surmetis mian malnovan supertuton, kaj prezentis min ĉe la ĉefsekciestro Kovacsics.

— Vi estas flankenmetita rezervo — diris kamarado Kovacsics. — Ni aktivigos vin, provizore en la rolo de kamparana patro, sed eble, se vi bone laboros, ni promocios vin al avangarda proleta patro. Ni donos al vi postenon ĉe la kulak-linio.

Mi devis stari dum tuta tago en la montrofenestro de iu provinca kooperativa vendejo, kaj fingromontri al duona sako da faruno, al bareleto da graso kaj naŭ tabuletoj da gluo: „la kulakoj forprenis ĉion ĉi disde miaj infanoj". Dum la tempo de la organizado de la kamparanaj kooperativoj mi fariĝis avan-subskribanto. Ĉiutage ĉiam en alia vilaĝo mi subskribis la aliĝliston la unua: „Mi, kiel hungara patro, povas certigi la futuron de miaj filoj nur en la kadroj de la socialisma, grandbiena mastrumado." Poste mi sukcesplene kunlaboris en la kampanjo de la subskribo de plan-pruntoj. Kamarado Kovacsics plenumis sian promeson: li promociis min je proleta patro, kaj poste, konsiderante mian aĝon, je proleta avo.

En tiu mia rolo kiel Anti-Nikolao mi helpis venki la klerikajn antaŭjuĝojn. Mi disdonis al la infanoj broŝurojn anstataŭ bombonojn. Kelkfoje mi devis skribi leteron en iu gazeto al mia filo pri lia malprogreso en la laborkonkurso, ke mi, kiel hungara patro, tre hontas pro la afero, kaj mi esperas, ke li baldaŭ atingos la avangardon.

Oktobro de 1956 trovis min preta. Mi alhokigis mian laboristan kombineon, kaj prenis el la ŝranko mian hungaran kostumon. Mi povas diri: kun ĉi tiuj du kostumoj oni povas traaktori la tutan hungaran historion ekde la unua duono de la dudeka jarcento. Mi ricevis relative simplan taskon: mi devis stari sur kamiono kaj ĉirkaŭporti en la urbo brulantan kandelon. La kamiono kelkfoje haltis kaj mi kriis: „Hungaroj, ĵuru!" La amaso surgenuiĝis kaj ĵuris kiel mi, kvankam ili tiel same ne sciis, pri kio ili

ĵuras, kiel mi. Sed la ĵuro estis tamen edifa vidaĵo kaj fortigis la nacian senton. Kaj tio por hungara patro estas pli grava ol ĉio ajn.

En novembro de 1956 mi enŝrankigis mian nacian kostumon kaj revestis la supertuton. Mi pensis, ke mi anoncos min kiel vetrano. Nome, kamaradoj Anti-Nikolaoj dungiĝis plejparte en tiu branĉo. Sed la Ŝtata Demagogia Oficejo estis likvidita. Ankaŭ kamaradon Kovacsics mi vane serĉis. En la ministerio oni sendis min al iu malgrasa, barbhava viro, kiu rakontigis al si mian biografion. Kiam mi finis la rakonton, li serioziĝis.

— Mi tre ĝojas fine ekkoni vin persone. Nome, dum nia vivo ni kelkfoje renkontiĝis. Se vi estas la „Hungara Patro", tiam mi povas diri pri mi, ke mi estas la „Hungara Filo". Min vi bonvolis sendi al batalkampo komence en la unua, kaj poste en la dua mondmilito. Intertempe vi incitis kontraŭ mi la socialdemokratojn, poste la hungarajn naziojn. Tamen, ne pro venĝemo mi ne donas al vi postenon, sed ĉar ni jam simple ne bezonas viajn servojn.

La malgrasulo enpensiĝis.

— Sed por montri, ke mi tamen estas al vi bonvola, mi proponas al vi sezonan okupiĝon. Sur la Placo de Herooj ni nun renovigas la statuogrupon de la Sep Gentestroj. Bedaŭrinde, intertempe difektiĝis la kapo de Gentestro Taksony. Tre malagrable, ĉar, se eksterlandanoj aŭ reakciuloj rimarkos la mankon, ili tuj pensados: kial ni neglektas ĝuste lian personon el nia nacia pasinteco? Eble ili eĉ povos pensi, ke Gentestro Taksony fariĝis opoziciulo. Ĉu vi emus stari sur la loko de Taksony, ĝis ni regluos la kapon? Laŭ mia opinio, tio ne estas peza laboro kaj vi efektos tie dekorative.

Mi akceptis la postenon. De tiam mi staras tie, sur la piedestalo inter la Gentestroj okupintaj la patrujon antaŭ mil jaroj. Vespere, kiam neniu promenas tie, mi provas konvinki la Ĉefgentestron Árpád, ke li, kiel Hungara Patro ne estus devinta domaĝi la penojn kaj halti en la Karpata baseno, sed je kelkaj basenoj pli malproksime li devintus serĉi hejmon por siaj filoj.

El la hungara: Sándor *Szathmári*

Gentestro Taksony (Foto de Z. Fejér)

Mihail Săulescu

ETERNECO

Bovĉcaro, popo, ĉerko, maljuna avineto
Kaj la vespero vena — jen ĉio ĝia predo:
Eĉ la falanta suno jam ekflavanta pale,
Refoje rigardanta al mondo demontare.

Tiom... Nur tiom estas sepulto, entombado,
La popo preĝas iom tirvoĉe sen kompato.
la avineto ploras, la bovoj marŝas lante,
Egalanime kvazaŭ nur hejmen promenante.

Nur tiom! Preterestas vilaĝoj en la valoj,
Ne estas kial plori, ja mankas la kialoj,
La bovoj tiras jugon, kutime sub la vergo...

Kaj en la griza muto la suno malaperas,
Kaj kiel ĉiam, kiam sensune ekvesperas,
Tri poploj altas fore en la restinta lumo,
Iliaj ombroj longas... Surkampe densas fumo...

El la rumana: Imre *Szabó*

ESPERANTAJ LIBROJ EL HUNGARIO

A) LERNOLIBROJ, VORTAROJ, BILDRAKONTOJ

1. Baghy, J.: GRAMATIKA DEMANDARO RESUMA. 21 cm, 70 p. Prezo: 6,60 gld.
Didaktikaj demandoj kaj respondoj pri la Esperanta gramatiko.

2. Baross-Kóródy, Zs.: GRAMATIKA EKZERCARO al „Esperanto 1" de I. Szerdahelyi. 28 cm, 106 p. Prezo: 9,- gld.
Tre variaj gramatikaj ekzercoj kompletige al la populara lernolibro. Librofine ĵlosilo kun la ĝustaj solvoj.

3. Benczik, V. (red.): BAZA LEGOLIBRO POR KOMENCANTOJ. 21 cm, 117 p. Prezo: 13,80 gld.
Tridek sep historietoj verkitaj per la vortoj de la unuaj tri (ĉ. 400 vortoj), respektive de la unuaj kvin (ĉ. 700 vortoj) oftecgrupoj de la Baza Radikaro Oficiala, kompilita de la Akademio de Esperanto. La libron kompletigas vortareto de ĉiuj uzitaj vortoj, kun tradukoj en la angla, germana, hungara, rusa kaj pola.

4. Benczik, V. (red.): La kato en la sako. (Legolibro) 15 cm, 133 p. Prezo: 2,40 gld.
Antologieto el la originala Esperanta literaturo: verkoj de Auld, Boulton, Rosbach ktp.

5. ESPERANTA-KAMBOĜA VORTARO. 21 cm, 148 p. Prezo: 18,- gld.
La unua lernilo de Esperanto en tiu Azia idiomo.

6. Gárdonyi, G.: STELOJ DE EGER. (Bildrakonto) 24 cm, 64 p. Prezo: 6,- gld.
Bildrakonta adaptaĵo de hungara junulara romano, kies agado disvolviĝas en la 16a jarcento, dum batalo kontraŭ la turka invado.

7. Golden, B.: MARĜENE DE LA LERNOLIBRO. 21 cm, 70 p. Prezo: 6,60 gld.
Prilingvaj artikoloj por kursfinintoj, kun speciala atento al la plej oftaj eraroj.

8. Lienhardt, A.: AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO. 21 cm, 144 p. Ilustrita. Prezo: 13,80 gld.
Dudek spritaj dialogoj por progresigaj kursoj, kun entute 850 didaktikaj demandoj kaj respondoj.

9. Lienhardt, A: AMUZA LEGOLIBRO EN ESPERANTO. 21 cm, 226 p. Ilustrita.
Cent amuzaj historioj diverslongaj; ĉiun historion sekvas po de didaktikaj demandoj kaj respondoj.

10. Mészáros, B.: OKLINGVA NOMARO DE EŬROPAJ BIRDOJ. 28 cm, 138 p. Prezo: 12,90 gld.
La nomoj de 579 Eŭropaj birdoj en la lingvoj angla, germana, rusa, pola, ĉeĥa, latina, Esperanta kaj hungara, kun taŭgaj indeksoj ebligantaj facilan uzadon kun ajna elira kaj cel-lingvo.

11. Prus, B.: LA FARAONO. (Bildrakonto) 24 cm, 44 p. Prezo: 4,80 gld.
Bildrakonta adaptaĵo de la fama pola romantika romano pri la antikva Egiptio.

12. Seppik, H.: LA TUTA ESPERANTO. 21 cm, 184 p. Prezo: 15,- gld.
Kurslibro por progresantoj, kun multaj gramatikaj kaj stilaj ekzercoj. Detala gramatika indekso helpas uzi ĝin ankaŭ kiel gramatikan manlibron praktikan.

13. Szerdahelyi, I.: ESPERANTO 1. 24 cm, 260 p. Riĉe ilustrita. Bindita. Prezo: 9,- gld.
Rektametoda lernolibro por komencantoj.

14. Szerdahelyi, I. ESPERANTO 2. 24 cm, 227 p. Riĉe ilustrita. Bindita. Prezo: 9,- gld.
Rektametoda lernolibro por progresantoj, kun vasta movadhistoria kaj literatura legmaterialo.

15. Taskfolioj por komencantoj. 28 cm, 32 p. Prezo: 6,- gld.
32 taskfolioj bone uzeblaj en elementaj kursoj.

16.Twain, M.: LA AVENTUROJ DE TOM SAWYER. (Bildrakonto) 24 cm, 32 p. Prezo: 4,80 gld.
Bildrakonta adaptaĵo de la konata Usona junulara romano.

B) BELETRO
Originalaj verkoj:

17. Adrianova, N.: VAGANTE TRA LA MONDO MALTRANKVILA. (Poemaro) 21 cm, 110 p. Prezo: 13,80 gld.
La poemaro de la ukraina esperantistino prikantas la internacian amikecon kaj la pacsopiron de la homoj.

18. ALMANAKO DE BULGARAJ ESPERANTISTOJ. 24 cm, 141 p. Prezo: 13,80 gld.
Tiu ĉi antologio enhavas originalajn verkojn de bulgaraj esperantistaj aŭtoroj: ĝi donas bonan superrigardon pri la originala verkado en Bulgario.

19. Baghy, J.: HURA! (Romano) 21 cm, 426 p. Bindita. Prezo: 36,- gld.

JULIO BAGHY

Strangulo testamentas 230 milionojn da dolaroj al la ĉefurbo de la imagita lando Bagonio, sed la testamento preskribas kondiĉojn tre malhonorigajn por la urbaj gvidantoj. El la spritega baza ideo disvolviĝas la varia agado de eble la plej interesa romano de la klasika prozisto, en modele esprimriĉa, tamen esence facila lingvaĵo.

20. Gorov, H.: RIBELA KORDO. (Poemaro) 21 cm, 71 p. Prezo: 8,10 gld.
Poemaro unuavice pri sociaj temoj. Granda parto de la poemoj aperis ankaŭ surdiske.

21. Grigorov, A.: GARDU LA PACON! (Poemaro) 18 cm, 120 p. Prezo: 10,80 gld.
La centra temo de la poemaro estas la pacbatalo. Poemoj verkitaj kun alta formokulturo.

22. Hules, A.: KATOJ KAJ ĈEVALOJ. (Poemaro) 21 cm, 80 p. Prezo: 12,- gld.
Moderntona poemaro, ricevinta tre favoran akcepton ĉe la poeziamantoj.

23. Lorjak: EŬLALIA. (Romano) 21 cm, 188 p. Prezo: 21,- gld.
Virtuoze verkita humura-detektiva romano, kun ironia amasigo de hazardoj kaj nekredeblaj okazaĵoj. Krimo, ĉantaĝo, familiaj sekretoj — kaj rido, neelĉerpeble...



24. Lorjak: ILUZIOJ. (Novelaro) 21 cm, 184 p. Prezo: 18,- gld.
Dek noveloj de la populara franca esperantista aŭtoro, en kiuj sub la ironia stila ŝelo kaŝas sin profunda homamo.

25. Lorjak: MARIAGNES. (Romano) 21 cm, 220 p. Prezo: 21,- gld.
Emerita Pariza bankoficisto enamiĝas al matura sinjorino nomata „Maria", pri kiu baldaŭ evidentiĝas, ke ŝi estas fakte la iam mondkonata filmstelulino Agnes de Vitry. Sed la amrilato disvolviĝas ne senprobleme, la kompatinda bankoficisto miksiĝas en nekredeblajn kaj ridigajn aventurojn... la verko promesas bonan amuzon, kiel ĉiuj Lorjak-romanoj.

26. Modest, J.: LA ORA POZIDONO. (Romaneto) 21 cm, 68 p. Prezo: 8,10 gld.
Tiu ĉi romaneto prezentas per la rakonto de enamiĝinta junulo, kiel la apero de junulino perturbas la harmonion de mezaĝa geedza paro kun tragika sekvo.

27. Nedelĉeva, N.: DUM NOKTA DEĴORO. (Novelaro) 21 cm, 80 p. Prezo: 12,- gld.

La noveloj kaj unuaktaĵoj de la bulgara esperantista aŭtorino priskribas pere de emociaj historioj la plej pozitivajn trajtojn de la homa naturo — sindonemon, fidelecon — kaj la kapablon pardoni.

28. Nemere, I.: LA ALTA AKVO. (Romano) 21 cm, 128 p. Prezo: 15,- gld.
La konstruado de granda hidrocentralo necesigas la evakuon de tuta vilaĝo. Tamen, troviĝas unu homo, kiu ne volas forlasi la domon, al kiuj lin ligas fortaj emociaj fadenoj...

29. Nemere, I.: LA BLINDA BIRDO. (Romano) 21 cm, 118 p. Prezo: 15,- gld.
En tiu ĉi sia verko la populara aŭtoro ekzamenas tion, kiagrade ŝtata maljusteco povas mizerigi la individuon.

30. Nemere, I.: FEBRO. (Romano) 21 cm, 131 p. Prezo: 15,- gld.
En tiu ĉi verko de Nemere sinteziĝas la elementoj de ama, psikologia kaj detektiva romano. Ĝis nun la plej multe vendita romano de la populara aŭtoro.

31. Nemere, I.: LA FERMITA URBO. (Sciencfikcia romano) 21 cm, 128 p. Prezo: 13,80 gld.
La agado de la atentoĉena romano disvolviĝas paralele en la 16a kaj 26a jarcentoj.

32. Nemere, I.: LA MONTO. (Romano) 21 cm, 166 p. Prezo: 16,50 gld.
Sur la pinto de alta monto vivas eta komunumo de pacaj homoj, kiuj izolis sin disde la moderna mondo. Tamen, dum la ĵus finiĝinta milito rifuĝis tien kvar soldatoj, kaj ili neniam revenis. Majoro Reman, kiu ricevas la taskon esplori la aferon, spertas sur la montopinto tre strangajn aferojn...



33. Nemere, I.: LA NAŬA KANALO. (Novelaro) 21 cm, 104 p. Prezo: 13,80 gld.
La unua Esperanta verko de Nemere enhavas novelojn sciencfikciajn kaj alitemajn. Multaj el ili estas verkitaj en tre simpla lingvaĵo, kaj jam ofte sukcese uziĝis kiel materialo de progresiga kurso.

34. Nemere, I.: SERĈU MIAN SONĜON. (Romano) 21 cm, 165 p. Prezo: 18,- gld.
Hungaraj geedzoj pasigas sian mielmonaton en Venecio. La edzo renkontiĝas tie hazarde kun sia armena amiko, kaj post kelkaj tagoj iu faras atencon kontraŭ la turka prezidento, vizitanta la belan italan urbon... Ĉu li helpu sian amikon, kiu estas teroristo?

35. Nemere, I.: SUR KAMPO GRANITA. (Romano) 21 cm,

124 p.
Ĉu dudek jaroj da sinofera, modela vivo povas pardonigi krimon faritan sub la premo de la cirkonstancoj — tio estas la kerna demando en tiu ĉi — laŭ multaj homoj la plej bona — romano de la hungara esperantista aŭtoro.

Tradukita beletro:

36. Aszlányi, K.: SEP VANGOFRAPOJ. (Romano) 21 cm, 148 p. Prezo: 15,- gld.
Senlabora junulo per gazetanonco deklaras, ke dum tuta semajno li ĉiutage vangofrapos la plej riĉan britan fabrikposedanton, kaj la minaco ne estas senbaza, ĉar la sagaca junulo sukcesas pri sia entrepreno. Kompreneble ĉio ĉi okazas inter tre amuzaj cirkonstancoj...

37. Benczik, V. (red.): HUNGARA ANTOLOGIO. 24 cm, 447 p. Bindita. Prezo: 57,- gld.
Pli ol 200 literaturaj pecoj, donantaj superrigardon pri la evoluo de la hungara literaturo ekde la 11a jarcento ĝis la nunaj tagoj.

38. Benedek, E.: HUNGARAJ FABELOJ. 21 cm, 71 p. Ilustrita. Prezo: 10,20 gld.
Dek fabeloj, esence popolaj, kolektitaj kaj reverkitaj de la aŭtoro, kiu estas nomata „la avo de la hungaraj infanoj".

39. Elem, J.: BETONTERAPIO. (Dramo) 21 cm, 35 p. Prezo: 6,- gld.
Absurda dramo, plurfoje sukcese prezentita en la Budapeŝta Teatra Festivalo. Kun paralela hungara teksto.



40. Gajdar, A.: TIMUR KAJ LIA TAĈMENTO. (Romano) 21 cm, 74 p. Prezo: 8,10 gld.
Kiel dum la milito la junpioniroj helpas la aĝajn parencojn de la soldatoj, batalantaj en la fronto — tion priskribas verve kaj interese Gajdar, profunda konanto de la infana animo.

41. Gáll, I.: OBSEDITA DE L' SUNO. (Romano) 21 cm, 186 p. Serio „Hungara Literaturo" n-ro 2. Prezo: 16,50 gld.
Tiu ĉi modernforma romano rakontas la

vivon de hungara virino inter la jaroj 1944-1970, kiu estis persekutita en 1944 pro sia raso, en 1949 pro sia patro, en 1957 pro sia edzo, kaj nur en la sesdekaj jaroj ŝi trovas harmonion vivon. Sed kiu redonos al ŝi la perditajn jarojn...?

42. Heltai, J.: LA MORTO KAJ LA KURACISTO. (Novelo) 21 cm, 18 p. Prezo: 1,80 gld.
Sprita novelo kun paralela hungara teksto pri kuracisto alvokita por kuraci la malsanan Morton.

43. József, A.: URBORANDA NOKTO. (Poemaro) 21 cm, 141 p. Serio „Hungara Literaturo n-ro 1. Prezo: 13,80 gld.
La volumo enhavas ĉ. 70 poemojn de la plej elstara figuro de la ĉijarcenta hungara poezio. Kelkaj poemoj aperas en pluraj tradukoj.



44. Kalocsay, K.: TUTMONDA SONORO I-II. (Poemaro) 21 cm, 664 p. Tole bindita. Prezo: 66,- gld.
Antologio de la tutmonda poezio: 581 poemoj de 185 poetoj. Ĉefverko de la traduka beletro en Esperanto.

45. Karinthy, F.: VOJAĜO AL FAREMIDO - KAPILARIO. (Du romanoj.) 18 cm, 182 p. Prezo: 13,80 gld.
Ambaŭ romanoj revivigas Guliveron, vojaĝigante lin al fantaziaj landoj.

46. Kemalov, N.: NAŬ JAROJ EN LA INFERO. (Rememoroj) 21 cm, 111 p. Prezo: 12,- gld.
Vigle, atentokapte verkitaj rememoroj de bulgara esperantisto pri jaroj pasigitaj en faŝisma koncentrejo.

47. Krúdy, Gy.: LA ROZO DE L' SULTANO. (Fabelo) 14x20 cm, 54 p. Riĉe ilustrita. Prezo: 8,10 gld.
La fabelo ĉerpas sian temon el la 17a

jarcento, el la tempo de la turka okupado en Hungario.

48. Móricz, Zs.: ĈIELA BIRDO. (Rakonto) 21 cm, 44 p. Prezo: 8,10 gld.
Rakonto pri virino, kiu spitas la tradicion kaj la deziron de la gepatroj, kaj edziniĝas al tiu viro, kiun ŝi amas.

49. Móricz, Zs.: MALRIĈAJ HOMOJ. (Rakonto) 24 cm, 36 p. Prezo: 2,40 gld.
Animskua rakonto pri soldato, kiu reveninte el la fronto daŭrigas la murdadon en sia vilaĝo.

50. Móricz, Zs.: VARMEGA KAMPARO. (Romano) 21 cm, 169 p. Prezo: 18,- gld.
La atentokapta verko, utiligante la rimedojn de la detektiva romano, akre kritikas la meznobelaron de la intermilita Hungario.

51. Petőfi, S.: JOHANO LA BRAVA. (Popolfabelo en versoj) 21 cm, 60 p. Prezo: 12,- gld.



Klasika peco de la hungara literaturo, kiu en la brila traduko de Kalocsay jam konkeris ankaŭ Esperantujon.

52. Tabi, L.: LA DAMO DE L' FATALO. (Komedio) 21 cm, 43 p. Prezo: 6,60 gld.
Ĉu estas konsilinde edzinigi virinon, apud kiu en la nupta nokto mortis jam du edzoj inter neklaraj cirkonstancoj — jen la baza temo de tiu ĉi amuza komedio, sukcese ludita en la Budapeŝta Teatra Festivalo.

53. Velkov, K.: VILAĜO BOROVO. (Romano) 21 cm, 148 p. Prezo: 12,- gld.
Romano pri okazaĵoj en bulgara vilaĝo dum la ribelo en 1923.

PRI LA LINGVO, PRI LA ESPERANTA LITERATURO KAJ MOVADO

54. Benczik, V. (red.): BAZA LITERATURA KRESTOMATIO. 19 cm, 282 p. Tria eldono. Prezo: 13,80 gld.
Originalaj verkoj de 59 Esperantaj verkistoj ekde Zamenhof ĝis la nuntempo, kun biografiaj notoj pri la aŭtoroj.

55. Blanke, D. (red.): SOCIPOLITIKAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO. (Studoj) 19 cm, 228 p. Prezo: 13,80 gld.
Studoj de elstaraj esperantologoj. La volumo enhavas ankaŭ la faman verkon de U. Lins: „Esperanto dum la Tria Regno".

56. Bleier, V. - Kökény, L. (red.): ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO. 24 cm, 600 p. Bindita. Prezo: 45,- gld.
La plej kompletá konsultlibro pri la heroaj unuaj jardekoj de la Esperanto-movado inter 1887-1934. En la Jubilea Jaro nepras havi tiun ĉi monumentan verkon.

57. Gilbert, W.: PRI LANDNOMOJ EN ESPERANTO. (Studo) 21 cm, 12 p. Prezo: 1,80 gld.
Resuma studo pri tiu ĉi multe diskutata lingvistika problemo.

58. Kalocsay, K.: DEK PRELEGOJ. (Literaturaj eseoj) 21 cm, 126 p. Prezo: 13,80
La volumo enhavas ĉefe aliloke neaperintajn priliteraturajn prelegojn de Kalocsay, krome ankaŭ lian klasikan studon pri la Esperanta vortfarado.

59. Kalocsay, K.: KIEL VERKI KAJ TRADUKI POEMOJN? (Du studoj) 21 cm, 27 p. Prezo: 1,80 gld.
La kajero enhavas la studojn „La esperanta rimo" kaj „Pri la esperanta ritmo". Legi ilin tre utilas ne nur por verkantoj, sed por ĉiuj, kiuj volas ekkoni la propran Esperantan normaron pri rimo kaj ritmo.

60. Pechan, A. (red.): GVIDLIBRO POR SUPERA EKZAMENO. 19 cm, 358 p. Prezo: 15,- gld.
La populara studlibro konsistas el tri partoj: la unua pritraktas la historion de la Esperanto-movado, la dua la historion de la Esperanta literaturo, la tria la metodikon de la instruado de Esperanto.

D) KOMPUTADO

61. FIDINDECO. (Artikolaro) 24 cm, 64 p. Ilustrita. Prezo: 7,50 gld.
La apero de grand-storivaj, rapidaj komputiloj naskis novajn aspektojn de la datum-sekureco. Ilian teorian priskribon kompletigas interesaj historioj pri krimoj kaj katastrofoj, en kiuj iun rolon ludis ankaŭ komputiloj.

62. FORMO KAJ SONO. (Artikolaro) 24 cm, 64 p. Ilustrita. Prezo: 7,50 gld.
Perkomputila bildo-prilaboro, programlingvo LOGO, komputiloj en muzikarto, kaj artikoloj interesaj speciale por blinduloj.

63. Frank, H. (red.): KIBERNETIKO DE LA HOMA LINGVO. (Studoj) 21 cm, 192 p. Prezo: 15,- gld.
Internacilingva materialo de la 9a Internacia Kongreso de Kibernetiko.

64. KIBERNETIKO. (Artikolaro) 24 cm, 64 p. Prezo: 7,50 gld.
Tiu ĉi volumo celas malmistifiki kibernetikon, demonstri, ke ĝi estas praktika, komprenebla scienco-branĉo, traplektanta nian tutan vivon.

65. MIKROELEKTRONIKO. (Artikolaro) 24 cm, 64 p. Prezo: 7,50 gld.
Ĉiu homo volonte ekscius, kiamaniere oni produktas la „animon" de la mikrokomputiloj, la mikroprocezilon. Tiu ĉi eldonaĵo donas respondon al la bazaj demandoj, kaj ĝi konigas ankaŭ la historion de la mikroelektroniko.

66. PROGRAMADA TEKNOLOGIO. (Artikolaro) 24 cm, 64 p. Prezo: 7,50 gld.
La programara krizo antaŭ nelonge ektremigis komputadon. Oni detale povas informiĝi el tiu ĉi volumo pri ĝia esenco, kaj eĉ pri la elirvojo el ĝi.

67. RETOJ. (Artikolaro) 24 cm, 64 p. Prezo: 7,50 gld.
La unuopaj artikoloj de la kolekto konigas la transnaciajn retarojn, la lastatempe aktualiĝintajn ekrangazeton kaj teletekston, eĉ la komunikadajn satelitojn. Oni ricevas enkondukon ankaŭ en la teknikan realigon de la retoj.



68. ROBOTOJ. 24 cm, 64 p. Prezo: 7,50 gld.
La monotonan, malfacilan kaj danĝeran fizikan laboron jam pli kaj pli ofte transprenas robotoj. Sed de kie ili devenas, kiamaniere ili funkcias? Interesaj artikoloj respondas al tiuj demandoj.

69. TEKSTOPRILABORO. (Artikolaro) 24 cm, 64 p. Prezo: 7,50 gld.
La artikolaro okupiĝas pri la lastatempe plej intense evoluinta branĉo de la komputado. Internacie rekonataj fakuloj verkas pri la parol-sintezo kaj -analizo, programaro por verkistoj, sed la plej interesa parto okupiĝas pri la maŝina tradukado, pritraktante ankaŭ la utiligon de Esperanto.

E) DIVERSAJ TEMOJ

70. BARANYA, LA MISTERA. 21 cm, 44 p. Prezo: 3,60 gld.
La kajero prezentas unu el la sudaj departementoj de Hungario.

71. Barcsay, Zs. (red.): METODIKO EN LA PRAKTIKO. (Artikolaro) 21 cm, 140 p. Prezo: 15,90 gld.
La volumo enhavas kontribuaĵojn de pedagogoj mem instruantaj Esperanton — tial la temoj de la artikoloj vere tuŝas la plej praktikajn kaj plej aktualajn problemojn de la instruado de Esperanto.

72. 133 TAGOJ. (Antologio) 19 cm, 244 p. Prezo: 12,- gld.
Literaturaj kaj aliaj verkoj pri la Hungara Konsilia Respubliko, la unua hungara proleta ŝtato, vivinta dum 133 tagoj en 1919.

73. Cvetkova, V.: VOJAĜIMPRESOJ PRI JAPANIO. 21 cm, 84 p. Kun kolora frontpaĝo kaj ok paĝoj da koloraj fotoj. Prezo: 12,- gld.
La aŭtorino raportas pri sia prelegvojaĝo en Japanio freŝe, agrable, la leganto kvazaŭ mem trapasas kun ŝi la belan vojaĝon. Kun abundaj informoj pri la ĉiutaga vivo de japanoj.



74. Dinnyés, J.: AL VENKO! (Kantaro kun muziknotoj) 21 cm, 24 p. Prezo: 6,- gld.
Propraj kantoj de la populara hungara pop-kantisto, antaŭ kelka tempo debutinta en Esperanto, krome kelkaj originalaj Esperantaj poemoj, kiujn li mem muzikigis. Ekzistas ankaŭ kasedo kun tiuj ĉi kantoj.

75. EKOLOGIO KAJ EKONOMIKO. (Studoj) 21 cm, 94 p. Prezo: 9,- gld.
Kolekto de prelegoj, prononcitaj en Budapeŝta scienca konferenco.

76. Révész, S. (red.): DILEMOJ DE LA NUNTEMPO — VIDE EL HUNGARIO. (Studoj) 21 cm, 104 p. Prezo: 12,- gld.
Studoj de elstaraj hungaraj sociologoj kaj ekonomikistoj pri la ekonomiaj kaj sociaj ŝanĝoj okazantaj lastatempe en Hungario.

77. TURISTA KANTARO. 21 cm, 84 p. Prezo: 8,10 gld.
51 kantoj, plejparte internacie konataj, kun muziknotoj.

La subajn librojn Hungara esperanto-Asocio liveras nur al socialismaj landoj. El aliaj landoj oni mendu ilin ĉe UEA.



78. Auld, W.: PAŜOJ AL PLENA POSEDO. (Legolibro) 19 cm, 229 p. Prezo: 21,- gld.
La plej populara progresiga lernolibro, konsistanta el tridek legaĵoj kun ekzercoj.

79. Dudich, E.: ĈU VI KONAS LA TERON? 24 cm, 150 p. Ilustrita. Prezo: 12,- gld.
Funda kaj eĉ por laikoj atentoĉene interesa popularscienca verko pri geologio.

80. GEOLOGIO INTERNACIA 1984. (Studoj) 21 cm, 252 p. Prezo: 9,- gld.
Kolekto de studoj de diverslandaj fakuloj pri geologio.

81. Koutny, I. (red.): PERKOMPUTILA TEKSTOPRILABORADO. (Studoj) 22 cm, 336 p. Prezo: 30,- gld.
Dudek unu studoj pri aktualaj aspektoj de aŭtomata tekstoprilaboro; kun ampleksa bibliografio, biografiaj notoj kaj resumoj en la angla kaj rusa.

82. SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ 1982. (Studoj) 24 cm, 66 p. Prezo: 6, - gld.
Materialoj pri diversaj sciencoj.

83. SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ (TER-SCIENCOJ). 24 CM, 96 P. Prezo: 9,- gld.
Studoj pri paleografio, tertremoj, arkeologio, zoografio, astronomio, minado.

84. SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ (TEKNIKO). 24 cm, 96 p. Prezo: 9,- gld.
Materialoj pri inercirado, sciencaj nocioj, vakutekniko, metalforteco, ŝutaĵ-transporto, sismiko, metaltranĉado, leviloj, kondukmaterialo.

85. SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ (KOMUNIKADO). 24 cm, 96 p. Prezo: 9,- gld.
Materialoj pri lingva komunikado, perkomputilaj tradukadoj kaj tekstoprilaboro, edukado kaj la homa cerbo, radiofrekvencaj kabloj.

86. Szilvási, L.: Radioteknika artikolaro. 24 cm, 84 p. Prezo: 7,50 gld.
Dudek tri altnivelaj fakaj artikoloj, abunde ilustritaj, kun terminareto kaj bibliografio.

Originala poezio

Baldur Ragnarsson:

TRANSPORT

La ponto tremis super mia kapo
pro la ŝarĝaj pezoj de la transportantaj aŭtoj
dum saltis la poemeroj el la kirliĝantaj akvoj
kaj serĉis ekvilibron laŭ fremda ordigo.

La ŝtonoj sub miaj piedoj parolis fridan lingvon
pri foraj fontoj kaj montaraj sombroj
malmilda gramatiko gvidis alkomprenon
de malsubjektivaj spertoj taŭgaj por sendormantoj.

Krepuskaj vortoj moligis la arkajn konturojn
premetaj kunlaborigi ilin por la fina procezo
hejmigi la sintakson en la aŭtistajn kapojn
por senŝarĝa transporto

Baldur Ragnarsson:

ANASOJ

Vi kiu pintas la flugon de la sovaĝaj anasoj
por posta ripozo sub miaj senmovaj palpebroj,
vin mi demandas:
Kion vi celas?
Kion vi spertas transflugante la montojn?
Kion vi sonĝas interne de mia menso?

Obtuze sonas la recitativo de la pastro
kaj la peza paŝado de la laboristoj
preter la stratangulon,
la branĉoj de la betuloj sekcas la ĉielan fonon
kaj la petoj de la infanoj
disiĝas kiel maldiafanaj perloj.

El propraj pensoj konstruas sin la poemo
etendas siajn tentaklojn tra la komputilon
aranĝas siajn trovojn laŭ la kontrastaj vojoj
de miaj fingroj kaj sentoj.

Poste mi piediras sub la helan lumon
kolektas la flugon de l' anasoj tra miaj pupiloj
por plua esploro kiam la dormo invitas
vin

Albert Goodheir:

MALGRAŬ ĈIO

„Malgraŭ ĉio, mi nun plugis sulkon por kantontoj novaj,
skiis sulkon, rompis branĉojn, sarkis suprojn, markis padon.
Jen la vojo nun atendas, pado nova pete gestas,
al kantontoj kompetentaj, al pli bonaj, lertaj bardoj
inter la gejunularo, kiu nun kaj post mi kreskos."

(Fino de KALEVALA)

Malgraŭ ĉio, kio laŭtas, kio raŭke sin asertas,
tempovipo, timokrado, murdminaco, homizolo,
celas mi la ĉenon rompi, preterpasi la barilon,
ĉerpi el la Nornofonto guton de pratempa saĝo.
Mi solecan padon paŝis, frontis al la vintra vento,
sekvis en senplanda neĝo cervohufon, lutrospuron.
Nun printempo proksimiĝas, oras jam avelofloroj,
kiel suko en la trunkoj supreniras el obskuro
vortoj kiuj kverke fortas, bildoj kiuj pensoplenas,
kaj medite, pordorigle, okulferme mi alcentras,
ĝis senmuras mia ĉambro kaj sentempas la momento,
ĝis, senombre kaj vitrale, tra mi lumas la eterno
kaj du mondoj renkontiĝas, kiuj tamen estas unu.

El „Enlumiĝo", poemaro eldonota de KARDO.

Mikaelo Ternavski:

* * *

Al Tibor Sekelj

iom da tempo mi ne moviĝis —
trezoraj minutoj...
birdoj alkutimiĝis al mi
kvazaŭ al arbo

ili ĉesis timi
ili vagis proksime
ili preskaŭ sidiĝis sur miajn brakojn
kvazaŭ sur branĉojn

tamen la homo ne povas
longe resti senmova
kaj mi ekpaŝis —
la birdoj fuĝe disflugis

mi iras
mi tretas herbojn florojn
mi iras
mi tretas formikojn skarabojn

ja alie ne eblas
se oni moviĝas

Nevena Nedelĉeva: LA BLANKAJ FLOROJ

— Tiam mi estis instruistino en Vidin, en la gimnazio — komencis rakonti la maljuna patrino, kiel mi nomis mian amindan patrinon de mia patro. — Mi instruis la germanan lingvon — ŝi daŭrigis —, pro tio mi facile interparolis kun la tri germanaj oficiroj, kiuj loĝis en nia domo proksimume unu monaton dum la milito.

La du pli aĝaj oficiroj estis tre seriozaj kaj parolis kun mi nur kiam estis necese demandi min pri io. Sed la tria, la plej juna, estis gaja, kantema junulo, kaj mi estis tre mirigita eksciinte, ke li estas edzo kaj havas du knabetojn-ĝemelojn. Mi opiniis, ke li estas apenaŭ dudekjara, tiel juna li aspektas. Sed li fiere diris, ke li jam estas grandaĝa — dudek kvar jara, solida viro.

Mi ekridetis. Liaj okuloj rigardis min, neatendite li prenis mian manon, kaj kisinte ĝin, diris:

— Tiel neordinare vi similas al mia patrino. Viaj bluaj okuloj, kiuj rigardas min kun zorgemo kaj amo, via rideto ĉiam memorigas al mi mian amatan patrinon.

— Eble — mi respondis — ĉar ĉiam, kiam mi rigardas vin, mi pensas pri mia filo, kiu estas mobilizita ĉe la aerdefendo. Vi kaj li, kaj ĉiuj junuloj estas miaj filoj, pri kiuj mia koro pensas, kiujn amas, kaj kun kiuj kune suferas.

— Mia patrino ĝuste tiel parolis... — li diris, kaj liaj okuloj neatendite pleniĝis per larmoj, kiuj ne falis, ĉar li englutis ilin.

— Ĉu via patrino jam mortis? — mi demandis.

— Jes. Sed jam denove ŝi estas viva! — li prenis mian manon, kaj denove ĝin kisis.

De tiam, vere, mi sentis lin kiel mian filon, kaj li en ĉiu sia libera minuto venis kantante al mi en kuirejon. Se vi povus imagi, kiel bone li kantis!

Li ĉiam parolis al mi pri sia amata edzino.

— Ni ekamis unu la alian preskaŭ en mia infanaĝo — li rakontis. Niaj domoj estis najbaraj, niaj gepatroj — geamikoj. Ni similis al du birdoj, kiuj ĉiam kune kantis, kuris, ludis...

Elzi estis du jarojn pli juna ol mi. Neniam ni kverelis. Ŝi ĉiam estis gaja, ridetanta kaj pri ĉio ŝi konsentis kun mi. Ŝiajn unuajn larmojn mi vidis, kiam mi devis soldatiĝi.

— Atendu min — mi diris al ŝi —, kiam mi revenos, tuj ni geedziĝos.

— Bone — ŝi ridetis, kaj mi eltrinkis per miaj lipoj ŝiajn larmojn.

Milito!! Ĉu vi scias, panjo — sin turnis Eriĥ al mi —, kio estas milito?... Ne, vi ne scias...

Malgraŭ ĉio, kiam mi edziĝis kun Elzi, ni kantis kaj estis senfine feliĉaj. Tiam mi estis dudekjara... Neniu kontraŭstaris pri nia geedziĝo... Estis milito... ni devis rapidi eltrinki la feliĉon antaŭ nia morto...

...Kiam mi eksciis pri la naskiĝo de la ĝemeloj, vi ne povas imagi, panjo, kiel mi kuris al nia montara urbeto, por vidi ilin. Denove kun mia amata Elzi ni estis senfine feliĉaj. Eble pro la patrineco, mia edzino estis bela kiel neniam. Kelkajn tagojn ni kune kantis al niaj beboj... Kune lulis ilin... kaj poste... denove al la batalfronto... Tiam Elzi ploris multe... kaj mi... kun granda peno mi disiĝis de ŝi, kaj de niaj ĝemeletoj.

Nun vi vidas ilin sur la foto. Ili aĝas du jarojn kaj tri monatojn... Mi vidis ilin nur trifoje. La renkontiĝoj kun ili kaj Elzi estis la plej feliĉaj tagoj en mia vivo. Tiam mi forgesis la militon. Mi kaj Elzi volis esti nur feliĉaj. Ni ludis kun niaj filetoj, ridis, kantis... Sed la libertempo finiĝis...

La lastan fojon, kiam ni estis kune, ni ambaŭ decidis, ke la kantado estas nia komuna vivo! En la kanto ni vivas kune kie ajn ni troviĝu...

Li eksilentis. Mi komprenis kial li tiel ofte kantis.

La du pli aĝaj oficiroj foriris. Restis nur Eriĥ, sed post kelkaj tagoj ankaŭ li devis foriri. La milito estis kruela, nesatigebla drako, kiu glutis ĉiotage milionojn da homoj.

Dum la lasta tago mi volis iri al Eriĥ; pro kio, mi jam forgesis. Irante al lia ĉambro mi ekfrapis facile sur la pordo. Neniu respondis. Mi ekmiris. Antaŭ kelkaj minutoj mi aŭdis lian kantadon. Ĉu li eliris? Mi malfermis la pordon kaj restis senmova ĉe la sojlo. Mi vidis Eriĥ-on, tenantan la foton de sia edzino kun ĝemeletoj, kaj plorantan.

Li ploris forte, senvoĉe..., metinte la kapon sur la tablon. Lia dorso skuiĝis pro la sufero.

Mi senbrue fermis la pordon. Post unu horo mi denove aŭdis lian kanton... Sed tiam mi ploris, pensante: — Kial, Dio mia, necesas tiu terura, malbenita milito! Kiuj frenezuloj igas la pacemajn homojn lasi siajn domojn, siajn amatojn, kaj iri mortigi aliajn homojn?

Kantante Eriĥ preparis sian pakaĵon, kaj antaŭvespere venis en la kuirejon al mi, kaj diris:

— Nu, kara panjo, ni devas adiaŭi... jam ankaŭ mi foriros... Se mi mortos... sendu, mi petas vin, tiun paketon al Elzi...

— Ah, vi mortos! Kial vi diras tion — mi kontraŭstaris.

— Estas milito, panjo... Sed, se mi restos viva, mi nepre venos al vi... por preni la paketon kaj ankoraŭfoje vidi vin...

Mi ĉirkaŭbrakis lin kiel mian filon. Li kliniĝis, kisis miajn du manojn kaj foriris...

Pasis monatoj... La germanoj jam perdis la militon. Nia urba hospitalo kaj lernejoj estis plenaj de vunditaj germanaj soldatoj.

En julio oni vokis min al la hospitalo. Iu vundita oficiro volis vidi min. Per tuta mia estaĵo mi sciis, ke li estas Eriĥ. Kun ĝojo ke mi revidos lin kaj kun granda maltrankvileco, mi rapidis al hospitalo. Enirante la ĉambron, mi serĉis lin inter la du vicoj de litoj, en kiuj kuŝis vunditaj soldatoj.

— Panjo — mi aŭdis mallaŭtan voĉon —, panjo!

Tuj mi haltis. Kun peno mi rekonis Eriĥ-on. Mi kliniĝis kaj kisis lian mortpalan vangon.

— Panjo — ekflustris Eriĥ —, mi ĝojas, ke denove mi vidas vin. Sed... Li fermis la okulojn. Eble li ne havis fortojn paroli? Eble li ekdormis?

Mi sidis senmove ĉe la lito. Eniris flegistino kaj diris al mi, ke li estis grave vundita.

— Ĉu li resaniĝos? — mi demandis tute mallaŭte.

Ŝi nur movis la ŝultrojn. Dum la sekvonta tago Eriĥ estis translokita en ĉambron kun du litoj. Li ne povis paroli, sed ĉiam sentis mian ĉeeston, kaj la fingroj de lia maldekstra mano movetiĝis. La dekstran manon mi ne vidis. Poste mi komprenis, ke ĝi estis fortranĉita...

Mi kaptis tiujn maldikajn fingrojn, kaj karesante lian manon, miaj larmoj falis el miaj okuloj, mi ne povis reteni ilin. Post kelkaj momentoj mi aŭdis lian flustron:

— Ne ploru, panjo!

Mi ne scias, kiom da tempo pasis, kiam mi trovis Eriĥ-on sufiĉe bone. Li estis sola en la ĉambro.

— Panjo, — li ekparolis — ĉu vi gardas la pakaĵon, kiun mi donis al vi?

— Jes, filo mia — mi respondis.

— Poste... post mia forpaso... vi nepre devos sendi ĝin al Elzi. En la pakaĵo estas mia taglibro. Mi ne povis regule skribi ĝin, sed ŝi devas scii, ke mi ĉiam, ĉiam pensis pri ŝi, kaj pri niaj ĝemeloj.

— Sed se vi iros al via lando...

— Ne, ne... Vi scias kien mi forpasos... sed sciu, panjo, el niaj vundoj, el niaj suferegoj elkreskos kaj ekfloros blanka floro... floro de la paco... Panjo, kara panjo, mi petas vin, plantu blankajn florojn sur mia tombo...

— Eriĥ, ne parolu tiel, vi tiel bone aspektas. Vi resaniĝos kaj vi vidos...

— Eble ĉiuj antaŭ la morto iomete resaniĝas por povi diri siajn testamentajn pensojn. Ankaŭ mia patrino tiel resaniĝis... kaj mi ĝojis, ke ŝi vivos... sed... en la sekva nokto ŝi mortis. Ankaŭ mi mortos... sed diru al mi, panjo, kial mi devas morti, kiam mi tiel multe volas vivi, ami, labori? Por kiu estas necesa la milito kiam ĉiuj popoloj volas vivi en paco? Mi vidis tion, panjo, mi vidis. Diru al mi, kial mi devis iri en fremdan landon por mortigi senkulpajn homojn? Mi vidis la suferojn de viroj, virinoj, infanoj... Foje mi vidis du knabetojn sur la strato. „Tiel elkreskos miaj ĝemeloj" — mi pensis kaj volis karesi iliajn kapetojn. Sed ili timege rigardis min kaj tuj forkuris. Ĉu mi estis sovaĝa besto, de kiu ili fuĝis?

...Sed skribu al Elzi, diru al ŝi mian lastan deziron, miajn lastajn vortojn: ke ŝi eduku niajn ĝemelojn vivi, labori kaj batali nur por la paco. Mi mortos dum milito, sed mi volas, ke ili vivu en paco... La milito estas terura afero... kredu min, terura afero... Mi vidis neordinarajn kruelaĵojn...

— Ne parolu tiel multe, mia filo, vi laciĝos.

— Mi jam ne timas paroli pri la vero — ridetis Eriĥ. Ĉu oni kondamnos min al morto? Ne! Mi jam estas komdamnita! Mi estas jam nenio!

Kaj li ridetis amare. Liaj okuloj estis plenaj de tiel granda sufero, ke mi eksploris.

— Ne ploru, panjo, sed voku miajn ĝemelojn al mia tombo, kaj diru al ili miajn lastajn vortojn... ke...

En tiu momento venis la flegistino. Ŝi diris, ke mi jam devas foriri. Mi ekrigardis al Eriĥ.

— Panjo, vi venos tiun ĉi nokton, ĉu? Mi volas paroli multe al vi...

— Mi venos — mi promesis. Sed kiam mi estis irinta tien, li jam estis senkonscia. Mi ne sciis, ĉu li notis mian ĉeeston, sed en la fajro, en kiu li brulis, li parolis pri la milito, pri la blanka floro de la paco...

Frumatene li kvietiĝis... forpasis...

Venis la 9-a de Septembro... Venis la Soveta Armeo, la bravaj sovetaj soldatoj... Venis paco... Revenis via patro.

Dum la tuta vintro mi estis malsana, kaj apenaŭ en la malfrua printempo mi povis viziti la tombon de Eriĥ. Kaj mi estis mirigita. Inter la herboj elkreskis alte verda tigo, sur kiu floris blanka floro. De kie estis veninta la semo de tiu ĉi blanka floro? Eble la vento semis ĝin?

— La maljuna patrino ĝemspiris. Eniris mia panjo.

— Ĉu vi denove parolas pri Eriĥ? — ŝi demandis.

— Jes, panjo — mi respondis —, vi scias, ke ĉiam kun intereso mi aŭskultas lian malgajan historion.

— Ankaŭ mi — diris panjo. — Jam pasis 30 jaroj. Ĉu certe la ĝemeloj venos por tiu glora dato de la paco, por viziti la tombon de sia patro?

— Verŝajne — diris la maljuna patrino. — Ili skribas, ke ili volas veni malgraŭ tio, ke ilia patrino pro la malsano ne povas akompani ilin. Sed neniam mi forgesos tion kiam ili venis por la unua fojo. Ili estis 16-jaraj junuloj. Kiel belaj, sveltaj ili estis! Ilia patrino tiam venis por la dua fojo. Ili aĉetis grandegajn bukedojn da blankaj floroj, kiujn metis sur la tombon de sia patro. En tiu momento unu el la ĝemeloj turniĝis kaj vidis apudan tombon, sur kiu tiel same floris blankaj floroj.

— Al kiu apartenas tiu ĉi tombo? — li demandis.

— Al soveta soldato — mi respondis. — Amiko de mia filo en la milito. Li enterigis lin en nian familian tombon. Kaj mi zorgas pri la tombo, ĉar ankaŭ li ne havis parencojn ĉi tie.

Tiam la du ĝemeloj forkuris kaj alportis same tiel grandegajn bukedojn el blankaj floroj. kiujn ili metis sur la tombon de la soveta soldato...

Tio estis la unua plenumo de la volo de ilia amata patro.

— Bone estus, se neniam plu estus milito, kaj miaj du filoj kaj tiu filineto — ekrigardis min mia panjo kun amo — vivus, kreskus kaj laborus en paco.

— Jes, — kapjesis la maljuna panjo, kaj en tiu momento mi vidis larmojn en ŝiaj okuloj. Eble ili estis por Eriĥ, eble por la soveta soldato, eble por ĉiuj junaj homoj, pereintaj dum la milito, kiujn ŝi sentis filoj same kiel mian patron.



coop hotels coop hotels coop hotels

Vi pagos unufoje — por ferii ĉiujare!

Ni komencis la organizadon de ESPERANTISTA FERIA VILAĜETO en la koro de la Hungara Ebenaĵo, apud la akvorezervujo de Kisköre, en la vilaĝo ABÁDSZALÓK. Ni ofertas por aĉeto jare 14-tagan uz-rajton. La akvorezervujo en sia preta stato havos akvosurfacon egalan al la kvinono de Balatono, sed ankaŭ nun ĝi jam elstare taŭgas por sinbanado kaj fiŝhokado.

coop hotels

La feria vilaĝeto estos konstruita el domoj de Alpa karaktero, de tipo PA-SA Cabinhotel. En ĉiu dometo troviĝas tri kabinoj kun po tri litoj. En la centro de la feria vilaĝeto staras je la dispono de la feriantoj komunaj kuirejo, manĝejo, necesejoj, duŝejoj kaj specialaj kaldronoj por subĉiela kuirado.

Ni planas funkciigi la ferian vilaĝeton inter la 1a de marto kaj la 31a de oktobro, ĉar la dometoj bone estas protekteblaj kontraŭ la malvarmo ankaŭ dum la antaŭ- kaj la postsezono.

Oni povas aĉeti uz-rajton por 14-taga feriado ĉiujara. La uz-rajto estas heredigebla, vendebla, kaj ĝin ne koncernas la hungaraj leĝoj pri limigo de posedo de nemoveblaĵoj. Ĝi estas ankaŭ luigebla.

Porinforma prezo de 14-taga uz-rajto: 39.000,- Ft.

Oni povas ricevi pliajn informojn per la telefonnumeroj 665-461 kaj 250-408, krome ankaŭ persone aŭ perletere. Adreso: Oficejo de COOPHOTELS, Budapest, XI., Karinthy Frigyes út 22. 1111

coop hotels

Kvina Internacia Literatura Forumo

(Budapeŝto, 7-9 novembro 1986)



La Internacia Literatura Forumo ĉijare elektis la temon „Kolomano Kalocsay, ĉu la Danto de Esperanto?", kaj, inde al la temo, la loko de la kunveno estis la urbo de Kalocsay — Budapeŝto.

En la unuaj du tagoj estis prononcitaj sep prelegoj, kiuj analizis diversajn facetojn de la kontribuo de Kalocsay al la Esperanta kulturo. Giorgio *Silfer* (prezidanto de LF-koop) prelegis pri la ĉeftemo, Georgi *Mihalkov* (Bulgario) ekzamenis la rolon de Kalocsay en la disvolviĝo de la moderna Esperanta poezio, Márton *Fejes* (Hungario) komparis tri tradukojn de „La tragedio de l' homo" (tiun de Géza Bárczi kaj la du tradukojn de Kalocsay, Perla *Martinelli* (ĉefredaktorino de LF) komparis certajn elektitajn trajtojn de la verkaro de Dante kaj Kalocsay, Vilmos *Benczik* (Hungario) parolis pri la efiko de la hungara kultura modelo al la vivoverko de Kalocsay, Magda *Ŝaturova* (Ĉeĥoslovakio) ĉefe substrekis la signifon de la Kaloĉaja verkaro por la esperantistaro en Slovakio, kaj Herbert *Mayer* (Aŭstrio) prelegis pri „Neologismoj. Kalocsay kaj la sekvo", atentigante ke la adeptoj de la nuna t.n. naturalisma skolo rigardas sin rektaj daŭrigantoj de Kalocsay — kio fakte estas malvero.

La prelegojn sekvis vigla diskuto, kaj, kiel ĉiam, oni luktis kun tempomanko.

Fine de la prelegoj Giorgio *Silfer* transdonis la premion „La Verko de la Jaro 1985" al István *Nemere* pro lia originala romano „La Monto". Jam la duan fojon Nemere-verko atingas tiun honoran titolon: la unua estis „La blinda birdo" en 1983. La premion por 1982 gajnis, „Lappar, la Antikristo" de Endre Tóth: tiel ĝin jam la trian fojon ricevis libro, eldonita de HEA.

La 9an de novembro la Forumo daŭrigis sian laboron en Abaújszántó, la naskvilaĝo de Kalocsay, kie d-ro Vilmos *Sághy*, la prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio inaŭguris buston de la elstara figuro de la Esperanta kulturo.

La 5an Internacian Literaturan Forumon partoprenis 40 personoj el ses landoj: la solenaĵon en Abaújszántó ĉ. 200 homoj — esperantistoj kaj lokaj loĝantoj.

Giorgio Silfer gratulas al István Nemere (Foto de Z. Fejér)



PANORAMO

Solenaĵo en Szolnok

La 4an de novembro okazis rememora festo en la urbo Szolnok, kie precize antaŭ tridek jaroj fondiĝis la Hungara Laborista-Kamparana Registaro, ĉekape kun János Kádár.

En la solenaĵo festparolis János Berecz, sekretario de la CK de la Hungara Socialisma Laborista Partio, kiu en sia parolo substrekis: la fondiĝo de tiu registaro estis la komenco de 30 jara paca, harmonia evoluo.

Sur nia foto: János Berecz (maldekstre) metas florkronon sur la memortabulon, starigitan omaĝe al la fondiĝo.



Rekonstruo de iama veturilo

Post kvardek jaroj estis rekonstruita interesa veturilo, kiu kunligas la okcidentan bordon de Danubo kun la burgmonto, sur kiu troviĝas la historia urbocentro de Budapeŝto. La interesan veturilon oni trenas per kablo, kaj ĝi glitas sur speciala relo: per tio ĝi ricevis sian hungaran nomon „Sikló" („Glitanta").

Tiu veturilo, videbla sur la apuda foto, kompreneble ne celas solvi la zorgojn de la urba transporto. (Foto de Z. Fejér)

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

PANORAMO

Kongresis industriaj kooperativoj

Meze de oktobro kunsidis en Budapeŝto la oka kongreso de la industriaj kooperativoj. La kongreso resumis la rezultojn de la industria agado de la kooperativoj, demonstrante, ke sur pluraj terenoj ili ludas avangardan rolon en la hungara industrio, dank' al siaj elastaj labormetodoj kaj sia perceptemo koncerne la teknologiajn novaĵojn.

Sur nia foto: partoprenantoj de la kongreso.

Beliĝas la urbocentro de Budapeŝto

La urbocentro de Budapeŝto ĉiam riĉiĝas per novaĵoj, kiuj feliĉe ĉiam akomodiĝas stile al la karaktero de tiu urboparto.

Lastatempe estis konstruita trapasejo inter la stratoj Váci kaj Sándor Petőfi, sub la nove konstruita Hotelo „Taverna". Kaj la fakuloj, kaj la publiko estas kontenta pri la arkitekta laboro – kio ne estas tre kutima afero, sed, kiel montras la apuda foto, la kontenteco ĉifoje estas komprenebla. (Foto de Z. Fejér)



PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

Jam en 17 grandurboj de 10 landoj

Vieno, Salzburg, Prago, Dresdeno, Berlino, Basel, Malmö,
Varsovio, Krakovo, Bukareŝto, Mangalia, Varno, Burgas,
Sofio, Ateno, Split, Romo

Vi povas alveni ripozinta,

UTASELLÁTÓ

se Vi veturas per la dorm- kuŝ- kaj manĝvagonoj de

Kie ajn Vi estas en la lando...

UTASELLÁTÓ

estas Via vojaĝpartnero!

Vizitu niajn restoraciojn, gastetojn, bufedojn.
Ni certigas manĝon por grupoj,
surprenas la organizadon de aranĝoj.
Ni alvokas Vian atenton
pri niaj duaklasaj restoracioj

ĈIE KAJ ĈIAM

UTASELLÁTÓ

REVUO DE REVUOJ

La grandioza manifestacio de nia movado, la Universala Kongreso en Pekino, ricevis kompreneble vastan eĥon en nia gazetaro. En EL POPOLA ĈINIO (11.) sur duoncento da paĝoj rebrilas — fakte kun tuta albumo da koloraj bildoj — la neforgeseblaj scenoj kaj paroloj, ankaŭ la opinioj — pri tiu vere kuraĝiga samideana renkonto de la tutmonda esperantistaro. Certe, tia eldonaĵo ankoraŭ neniam registris niajn kongresojn — ĝi estas do, por diri senflate, vera donaco kaj por la kongresanoj, kaj por la cetera legantaro.

Sen eblo tiel abunde raporti, tamen preskaŭ ĉiuj E-revuoj — precipe HEROLDO (10-11.) — donis siajn paĝojn por informi laŭeble pri ĉiuj programeroj, prezenti ankaŭ personajn raportojn de travivaĵoj kaj spertoj el la sin amike prezentanta granda lando, tiom grava por nia movado. Kaj ne mirinde, se troviĝas en granda monata revuo ankaŭ bagateliga voĉo nome, de riĉa brazilano, rasideano. Li kapablas akiri por si la eblon diskrii ankaŭ la politikan platformon de la brazila riĉa burĝaro. Kaj paralele eĉ en SENNACIULO (11.). Mi komprenas, la „klasbatala gazeto" de la proletaro volis konigi rekte el la fonto la kontraŭan starpunkton, same lian rabian indignon pro la malebligo fari la samon venontjare „jubileante".

Post interesa studo pri la E-libromerkato, Stefan Maul skizis grandan projekton en MONATO (10.), kiel li proponas plibonigi la staton de la E-gazetaro en monda skalo. Eĉ unuavide troveblas en ĝi utilaj kaj pripensidaj proponoj, precipe koncerne la eldonadon. Certe, necesigas tion la konata malvasteco de la legantaro, kaj proporcie la fortoj, personaj kaj financaj. Laŭ lia kategoriado, inter la „popularaj revuoj", kiuj estas destinataj antaŭenigi la ĉiutagan lingvon, prezenti multflankan legaĵon, la aŭtoro metas inter la unuajn nian revuon — H.V. — tamen, strange ĉe fakulo, li supozas ĝin, bedaŭrinde erare, ŝtate subvenciata. Estus ja bonvene kaj tre favore al la legantaro, se pere de subvencio eblus kontentigi la legantojn pli altnivele kaj en plia amplekso!

Informojn donas por la publiko franclingva nova suplemento de FRANCA ESPERANTISTO (374.), forte plivastigante la antaŭajn flavajn paĝojn. Eo kaj la paco — tiu estas la devizo, en kiu la redaktistoj klopodas kiel eble multrilate informi ne-esperantistojn pri la historio de la E-pacagado, pri ĝiaj praktikaj paŝoj kaj ebligoj personaj kaj kongresaj. Laŭdinde koncizan trarigardon ricevas la legantoj pri la ĉi-jaraj movadaj okazintaĵoj, ankaŭ pri Pekino, eĉ pri la novaj E-libroj.

Nu, pri E-kulturo riproĉas kaj prudente disputas nia Juan Régulo (ESPERANTO 7-8.) kontraŭ L. Mihajlov, kies artikolo neis la ekziston de E-kulturo, fakte per simpla etikedigo. La faktojn, kiuj efektive prezentas nian, iom apartan kvankam neniel izolitan, kulturon kun specifaj trajtoj, ja ne eblas konsideri landajnaciaj. Teoriumado ne kapablas ŝovi ekzemple idiomaĵojn aŭ „verdajn" figurojn de nia literaturo al la nacieco de la „farinto", parolanto aŭ verkisto. Mi ne lasu sen mencio, en la sama numero la projektojn de D. Masterman pri la solvendaj aferoj de nia gravega movado-centro, UEA. Ke mi jarfine ankoraŭ ne povas ĉerpi el la septembra-oktobra numeroj de ĝia revuo pri la aprecadoj de UK, ankaŭ montras al la bezonoj.

INTERNACIA ĴURNALISTO (3.) enhavas movade gravajn asertojn favore al nia agado en Afriko, el la plumo de ties direktanto, H. Bakker. La evoluhelpo al la tiea E-movado — el aparta Fondaĵo — stimulas grandegan laboron, li skribas, tiu estas tre efika. Ŝajnas utile legi klarigojn pri problemoj inter nacioj; tion oni ricevas en LA ESPERO (4.) pri la politika sinteno de la japana registaro al Koreio. La iama konkerinto de Koreio denove maltrankviligas Koreojn, ĉar la venko de la konservativa partio en Japanio aludas al la iamaj fiintencoj pro la fortikiĝo de la naciismaj tendencoj, pro repreparado de la „defendado", de la armeo. Cetere, pri rekreadaj intencoj de la fiaskinta imperiisma politiko, lige kun la industria akcelo, protestas ankaŭ la japanaj E-revuoj, kiuj ne volas forgesi pri la popolon ege damaĝinta politiko de Hirohito kune kun la germanaj nazioj.

Al THE AUSTRALIAN ESPERANTIST (9.) respondis André Albault, prezidanto de la Akademio de Eo, koncerne la konatan Rekomendon pri la landnomoj. Li substrekas, ke „i" en nomoj kiel Italio ne estas sufikso por landoj, sed nur „neŭtrala finaĵo", kiaj ekzistas ankaŭ en la naciaj lingvoj. Estas do direbla Jugoslavo aŭ Jugoslaviano samrajte; la E-a vesto modeste aldoniĝu al la jam ekzistantaj nomoj de l' ŝtatoj.

Ervin *Fenyvesi*

Szilárd Bálint

ANTINOMIO

S-ro Johano Tatai eliris el la restoracio, kie li laŭkutime tagmanĝis, al la proksima tramhaltejo. Tiutempe finiĝis ankaŭ la instruado en la najbara lernejo, sekve la lernantoj amase kuregis kun kriadoj al la alvenantaj tramoj. Ĉe la haltejo la infanoj grupe atakis la ŝtupojn de la tramo, senatente ili antaŭis la pliaĝulojn. La maljuna Johano enviciĝis inter la junuloj, kaj rimarkis, ke troveblas ankoraŭ libera sidloko. Li volis tie sidiĝi, sed iu juna virino krude flankenŝovante lin okupis por si la sidlokon. La „venkinta" virino ŝajnis forrigardi al la strato tra la fenestro por ne rimarki nian Johanon. Sed de sur la transa sidloko iu vidis tiun scenon, kaj transdonis sian lokon al Johano. La virino kaj Tatai vojaĝis longe, kiam la virino alrigardis Johanon kaj alparolis lin:

— Bonvolu, tamen, ne koleru min pro la okazintaĵo...

— Kial mi koleru kontraŭ vi — interrompis Johano ĝentile, por haltigi la ekskuzadon —, verŝajne vi malbonfartas, vi bezonis sidi. Miaflanke tute ne videblas mia granda aĝo, ĉar mi estis sportisto.

La vojaĝantoj trankviliĝis, vidante tiun kvietan interparolon. Kiam ŝi forlasis la tramon ĝentile adiaŭante Johanon, oni postrigardis ŝin, kaj iu diris al Johano:

— Ŝajnas, ke en ŝi fine venkis la pli bona sento...

En la angulo de la tramo interpremiĝis gajaj geknaboj, ne plej dece kondutantaj. Johano pensis pri la malboneco de la soleca vivo... Depost pluraj jaroj li estis vidvo, sole vivanta en sia loĝejo. Liaj filino kaj bofilo kiel kuracistoj estis multe okupataj, kaj nur malofte ili vizitis lin, foje nur pertelefone ili interesiĝis pri la bonfarto de Johano. Tamen ili klopodis helpi lin, ĝuste nuntempe ili donacis al li bileton por grupa vojaĝo al Prago.

Tien veturante la aŭtobuso, kie sidis Johano, estis plenplena. Oni laŭte interparolis, kaj apenaŭ oni rimarkis, ke la aŭtobuso forlasis la urbon. La ŝoforo sonigis la laŭtparolilon, estis aŭdebla reviga muziko. La partoprenantOj senzorge ĝuis la vojaĝon. Apud Tatai sidis junaspekta virino, kiu ventumis sin pro la varmego. Li servoprete demandis ŝin:

— Ĉu mi malfermu la fenestron: Vi havos pli freŝan aeron...

— Koran dankon... se tio ne ĝenos la aliajn...

Inter ili daŭris plu la interparolo, interalie pri la situacio de la maljunuloj inter la junuloj kaj la idoj. Poste en Prago ili restis unu kun la alia, tiel ili vizitis la vidindaĵojn. Johano eksciis, ke Elza estas emerita profesorino, solece vivanta vidvino, kiu havas filon, laborantan kiel inĝeniero de provincurba fabriko. Naskiĝis jam nepino ĉe li, sed Elza ankoraŭ ne vidis la etulinon. Elza esperas, ke baldaŭ ŝi ekvidos la alportitan nepinon, kion promesis la filo perletere.

La interamikiĝo progresis inter ili. Johano ofte vizitis Elzan, ili multe babilis pri si. De tempo al tempo Elza iris al Johano por fari purigon en lia loĝejo, foje li kuiris por li. La kontakto iĝis pli kaj pli intima inter ili, kaj Johano ekkuraĝis peti la manon de Elza. Li klarigis sian intencon tiel:

— Ni jam ne estas junaj. Por niaj infanoj ni faris multe, kaj ili jam ne bezonas nian helpon. Mi do pensas, ke la reston de nia vivo ni prefere dediĉu al ni mem, unu al la alia! Feliĉe, ni amas unu la alian eĉ pli varme, ol junaj paroj kutimas...

— Mia karega — respondis kortuŝite Elza — mi povas nur konsenti kun vi! Tiun nian interkonsenton decas sciigi al niaj infanoj, ĉu mi pravas?

Do tiel okazis. La filino de Johano tute kontraŭis lian deziron. Ĉu nur tiom malmulte valoras la memoro de la karega panjo, ŝi demandis, kaj paĉjo jam pensas pri alia virino? En lia aĝo oni tre malfacile konformiĝas unu al la alia, ŝi severe avertis sian patron. Kaj se la kunvivo fiaskos — ŝi lanĉis la minacon — eksplodos infero en la hejmo de la paĉjo!

Elza ricevis pli ĝentilajn vortojn de sia filo:

— La afero inter vi estas estiminda, sed pensu panjo pri la hejmaj postuloj de la aĝa viro, pri la multaj ŝarĝoj ĉirkaŭ li, kiuj premos vin! Aĝaj sinjoroj bedaŭrinde ofte entuziasmas pri belaj, junaj virinoj por senti sin junaj, kaj emas elspezi la monon por ili...

— Mi pli bone scias, kara filo, kia homo estas Johano! Dum unu jaro mi bone ekkonis lian karakteron — respondis Elza.

— Kiel vi volas, panjo, sed min interesas, en kiu loĝejo vi intencas loĝi kun li. Mi dezirus havi vian domon kaj la meblaron por via amata nepino...

— Sed via filineto estas ankoraŭ nur du jarojn aĝa! Kial vi volas senhavigi mín de mia domo, eĉ tiel ege frue?

— Jen, vi estis ĉiam egoisto, panjo! Anstataŭ helpi min, vi volas favori tiun ĉifonulon, tiun kadukulon! — kriadis la

„ĝentila" filo, kaj kolere alfrapis post si la pordon.

Johano kaj Elza havis amaran guston en la buŝo. Ili meditis pri siaj idoj, kial tiuj ne volas akcepti la fakton, ke ankaŭ maljunuloj bezonas iom de feliĉo, kial nur la propraj interesoj gravas por iliaj posteuloj? Fine Johano deklaris:

— Ni ekiros laŭ nia propra direkto! Ankaŭ ili estos maljunuloj, kaj tiam iliaj infanoj certe imitos siajn gepatrojn, kaj tiuj ĉi rericevos ĉiujn malbonaĵojn, kiujn ni ricevas de ili...

— Tamen, mia kara, mi petas... ni atendu ankoraŭ iom da tempo antaŭ nia fina decido. Mia filo minacis min, ke se mi edziniĝos al vi, tiam li submetigos min sub kuratorecon... — ploris timeme Elza, la fianĉino.

* * *

Kara Leganto! La redakcio ne konas la finon de ilia historio, tial ĝi petas vian helpon. Ĉu la geedziĝo bone sukcesis? Aŭ okazis la kuratoreco? La plej bona solvo ricevos libropremion, kaj la teksto (maks. 30 linioj) aperos en Hungara Vivo. Limdato: unu monato post la alveno de tiu ĉi rakonto.

DAŬRIGO

de la novelo

LA STRAŊGA VERDIKTO

aperinta en la numero 1986/2

Daŭrigas:

Martin Burns, San Diego, Usono.

Ambaŭ procesantoj — kaj ne laste iliaj advokatoj — avide atendis, kiel juĝos la tribunalo tiun ne-ĉiutagan konflikton. Ili ĉiuj ege memfide kondutis pri sia pravo, tamen interne malpli certe ŝvebis la konvinko pri la venko super la alia. Kaj vere, kiam la juĝisto solene deklaris, ke la tribunalo rifuzas la ambaŭflankajn peticiojn, la geedzoj interrigardis...

La juĝisto tuj donis ankaŭ la motivojn de sia juĝo, kiu signifis kompreneble, ke ne okazas eksiĝo. La tribunalo aŭskultis plurajn atestantojn. Inter ili la frato de la edzino Eva diris, ke li ja kisis sian fratinon, pensante, ke la fotinta virino estas eksterlanda vizitanto en la urbo. Ili eĉ donis permeson al ŝi, tute neglekteme, uzi la foton laŭdezire. Eva do ne kulpis malfidelecon.

Laŭ la juĝisto, la edzo povis iĝi kolera ekvidante la bildrevuon kun la priplendita foto. Dum la futbalmatĉo li entuziasme kriadis, samkiel la ĉirkaŭaj homoj. Okazis, ke li ĉirkaŭbrakis eĉ kisis la apud li sidantan nekonatan junulinon; sed li agis same — brakumante kaj kisante — rilate la aliflanke sidantan nekonatan viron. Tio estas decida argumento pri lia senintenca, ne peka konduto. Evidentiĝis krome, ke la patro de Eva influis ŝin eksedziniĝi, ne lasante ŝin konvinkiĝi pri la vera situacio koncerne la televidan scenon.

Manke de adultaj kondutoj, la tribunalo do ĉesigis la proceson, kaj finfine estis rekomendite al la edzino reiri al la familia hejmo, al Ede Pap.

Wilfred Owen
(1893-1918)

DULCE ET DECORUM EST

Sub sakoj oldulkline, ni kun sakroj
tra l' kot', megere tusaj, krampakruris,
ĝis dorson turnis ni al hantaj flagroj
kaj al ripoz' lontana peze spuris.
Dormantoj marŝis. Multaj perdis botojn
sed sangoŝuis plu. Fariĝis blindaj
ĉiuj pro lac', ne aŭdis eĉ eksplodojn
de gas-obusoj post ni teriĝintaj.

„Gaso! Rapide, knaboj!" Ni ĝustigas
la turpajn maskojn en ekstaz' mallerta:
ankoraŭ iu stumble kri-panikas,
baraktas kiel hom' en fajro verda.
Tra l' densa lumo, kvazaŭ li submaras,
mi vidis, ke li agonias drone.
En miaj sonĝoj mi senhelpa staras,
li min alsaltas, sufokiĝas drone.

Se ankaŭ vi koŝmare paŝus range
post tiu ĉar', sur kiun ni lin ĵetis,
vidus l' okulojn tordiĝantaj blanke
kvazaŭ diablon peknaŭziĝo retis;
se aŭdus vi dum-ire, kiel sango
el pulmoj koruptitaj ŝaŭmgargaras
obscene, kiel sur senkulpa lango
fiaĉa gusto de kancer' amaras,
vi ne, amiko, kun fervora gest'
al la infanoj, ardaj gloron sori,
mensogus: „Dulce et decorum est
pro Patria mori".

El la angla: William *Auld*

Spomenka Štimec:

Sentitole

(Fragmentoj el ankoraŭ sentitola prozaĵo)

Vojaĝo

La trajno preterglitis rizkampojn. La tuta pejzaĝo displektiĝis en ovalajn kaj kvadratajn lagojn el verdo. Lia rigardo, sopirema pri trankvilo ĝudigestis malvarmon de la krepusko.

— Pri tiuj kampoj necesus memori kiam rizaĵo ekmalvarmiĝos surletere. — konsilis li. La rizo kiun li vidis sur la telero estis tre delikata, sabatvespera. La tablotuko blankis, la forko estis apogita al la enteksita florpetalo. Ĝi nun leviĝos, enprofundiĝos en la blankan amaseton kaj elplonĝos. Iu vento, spirleĝera, kiu leviĝis de la kampoj ĝis la trajnfenestro, ne permesis flari la forkplenon. Ĝi malaperis. La humido de la kampoj maltrankviligis lin. Lia rigardo, subite tedita de la travidebla verdo, enfalis en la fendon inter la seĝo kaj la trajnmuro. En ĝi kuŝis io. Li evitis ĉirkaŭrigardi tra la kupeo, naŭzis lin malpuro. Li redirektis la rigardon eksteren kaj intencis revoki la blankan tablotukon. La rigardo vagis sekundon tra la plantidpintoj kaj ekmalobeis — nepetite ĝi enboriĝis en la fendon.

— Estas iu libro! — mesaĝis la rigardo.

Paŭlo ne volis esti ĝenata kaj gapis en la verdon.

— Estas iu libro! — ripetis la rigardo.

La okuloj restis fiksitaj al la pejzaĝo. La rigardo silente sekvis la kamplinion, sed decidis ne rezigni pri la trovaĵo:

— Iom nekutima la libro. Ŝajnas tre pura.

— Kiom trankvilige, la rizkampoj post tiu urbo!

Paŭlo parolis al la rigardo, por reteni ĝin ekstere. Sed ĝi ne plu interesiĝis. Pri nenia verdo.

— Prenu ĝin, nur por vidi la titolon. En kiu lingvo ĝi estis verkita?

Paŭlo ŝajnigis ne aŭdi la tenton.

Li starigis al si la demandon pri rizproduktado, kiel efektive oni plukas tion, subite iuj virinaj suroj aperis en la rizkampo.

La rigardo estis obstina kaj ŝovis lin kvazaŭ hundido per humida faŭko.

— Iu perdis ĝin. Forgesis — flustris la rigardo. Paŭl o ne volis tuŝi alies objektojn. Des pli ĉi tie. Ekde la vojaĝkomenco li sopiris je banejo. Je banejo, tre pura, kun blankaj kaheloj sur la planko kaj sur la muro, la akvo el la ruĝsigna krano varme enfluas en la lavujon. En la ovalo naĝas liaj manoj, etaj blankaj lunoj finas liajn ungojn.

La rigardo, jam laca de devojiĝo, puŝis lian manon en la fendon, la fingroj eltiris la kaptaĵon, blanka ĝi estis, iel nekutime blanka por tiu mondparto. Sed libro ĝi ne estis. Li unue ekdeziris, ke ĝi estu skribita cirillitere, ke li devu reenfendigi ĝin senkomprene.

Ĝi estis malfacile komprenebla, sed pro la manskribo, sur ĝiaj paĝoj literoj formike rapidis portante sian ŝarĝon en la denson de la lastaj paĝoj.

Li ekfartis malkomforte, kaptita en malpermesejo. Kvankam sola en la trajno, li kaŝis ĝin per ĵurnalo kaj eklegis.

— Jen veraj rizkampoj alvenas! — puŝis lin la rigardo ree al la fenestro. Li ne perceptis la mokon de la puŝo, li estis jam profunde en la kaptilo de la unua paĝo. La mielo de la virina manskribo ekgutis de la unua linio en la koron de lia scivolo.

„Litaĵon oni devus freŝe ŝanĝi, violkolore kaj skribi al vi el ĝi, violone. Via orelo devus resaniĝi por aŭdi kiel mi bandaĝas ĝin per kotonaj vortoj. Mi ŝovas ilin, la plej mildajn, en la malsanan orelon, moneron en ŝparujon porketforman.

Ĉiunokte vi mankas. Dum iuj noktoj pli ol ĉiuj. Tiun ĉi ekzemple."

Paŭlo moke rigardis la vortojn. Li elkreskis el la aĝo de amleteroj neniam atinginte ĝin. Rutino kaj ripeto fermis al li eblecojn de revo. Li fartis malkomforte kaj scivole, enrigardante en la virinan ĉambron. Ŝajnis ke la ŝtrumpoj kuŝis sur la seĝo ankoraŭ pufitaj de ŝia korpo.

* * *

Paŭlo, laca de la krurekzercoj sidiĝis en la hospitala parko. Kia plezuro havi horeton sen programo! Oni konstante nutras lin, ekzercigas, esploras. La hospitalo disponas pri lia tempo. Jen la malfeliĉo.

Kiam li sukcesas retiriĝi, kvazaŭ li trompus ĉiujn. Fripona plezuro de la eskapo de respondecoj. La folioj de la tiliarbo kaŝas lin, ŝajne ne nur de la sunradioj.

Li elprenas la kajeron de la trajno, la eksblankan: liaj manplatoj enpremis en ĝin grizajn makulojn. Ju pli li viŝas ilin, des pli ili griziĝas.

La kajero aŭtomate malfermiĝas ĉe la infanaĝo. Li konas la ĉapitron, sed li ŝatas ĝin.

Pri mia infanaĝo mi ŝatus paroli. Ni sidas en hotela ĉambro. Ekpluvis tuj post la matenmanĝo, de la promesita promeno denove nenio. Mi klopodas savi la tagon per rakontoj. Vi estas kolera kaj ne akceptas miajn trukojn. Viaj ŝuoj enlasas akvon, tio ŝajnas la plej granda problemo.

Mi ŝatas esti protektata. Havi tegmenton super la kapo, liton por la vespero. Ekde la naskiĝo. Ĉu mi diris al vi, ke mi naskiĝis en vilaĝa lernejo? Miaj gepatroj instruis tie. La loĝejo estis apud la klasĉambroj. La vilaĝo estis proksime de la landlimo. Ĝin mi ne memoras, nek la odoron de la malvarma milito. Sed jes la odoron de la planko ŝmirita per iu grasaĵo. Post tiom da jaroj ĝi naŭzas min. Prizorgis min iuj vilaĝaj knabinoj. Kiam ili tediĝis de mi, kaj tio tre rapide okazis, ili fuĝis. Kiam la pordisto sonorigis per la peza mansonorilo, oni devis porti min al la klasĉambro. Unu leciono ĉe la patro, unu ĉe la patrino. Laŭdire. Eble ili blagis. Mi ne povas memori: mi sidas en korbo, kreto knaras surtabule.

Al vilaĝaj knaboj la patro instruis literojn. Ankaŭ geografion. Postmilite, sen lerniloj, li sidis en iu granda ĉambro kaj mem desegnis siajn mapojn. Aŭstralion mi memoras. Ĝi kuŝis en blua makulo el maro. Aŭstralion mi ŝatis ne senkaŭze. Mia avino elmigris tien. Mi memoras la adiaŭon. Oni kuŝigis min en iun flankan ĉambron kaj lasis etan lumon, rozkoloran. Ŝi envenis kaj klinis sin al mi: en la roza lumo tuŝis min la haretoj de ŝia veruko. La lumo estingiĝis.

Poste venis iu pupo, enpakita en ruĝan ŝalon, tre molan. La ŝalon mi tre ŝatis tuŝi. La pupo estis iom rigida, ĝiaj manoj ne volis obei. La okuloj ne povis moviĝi dekstren-maldekstren, sed nur suben-supren. Tede. La okulharoj estis tute kunkreskintaj. Kaj la frizaĵon ne eblis ŝanĝi. Tiun kiun ŝi portis, ŝi devis porti ĉiam. Nomon mi ne donis al ŝi, ĝi restis la aŭstralia pupo. Jam delonge mi ne vidis ŝin. Foje mi provis enpuŝi ŝian okulon, sed ankaŭ ĝi estis rigida, ĝi ne moviĝis.

Mi ŝatus descendi al la plej praaj memoroj. Neeble. Iu servistino havis ruĝajn florojn sur la bluzo, kaptitajn en la reto el verdaj kvadratoj. Ŝi min ŝatis. Kaj ŝi sciis minaci, ŝi konis miajn feblojn. Hontinde konfesi, sed mi timis de biciklo. Ne ĉiam, nur kiam ĝi staris sola, en krepusko.

Kun mia patrino mi uzis ĝin, mia sidloko estis super la lasta rado. Estis tre plaĉe teni sin je risortoj sub la sidilo. Kiam ni vojaĝis super iuj truoj, ili knaris, mi skuiĝis. La sonon de ĝia knara ĝemado mi tre ŝatis. — Ĉu venos truoj? — demandis mi foje entuziasme. — Apartigu la krurojn! — admonis la patrino. Ŝi povis vidi mian sangantan piedon enpuŝitan en la radon, mia emo al knarantaj risortoj ne entuziasmigis ŝin.

Kutime oni veturigis min al la najbara vilaĝo al iu onjo. Oni elegantigis min, travidebla robeto el blanka organdio kun rozkoloraj pilkoj. Sur la hararo sidis rubando. Ĝin mi abomenis, perfidulilon. Foje mi fuĝis piede el la domo tra la kampoj. Perfidis min la rubando, ĝia papilio sur la hararo videblis super la tritiko. La patro alkuris por haltigi la papilion. Kien mi volis fuĝi?...

Attila József:

VI FARIS MIN INFANO

i faris min infano. Nur vane min kreskigis
la tridekvintra akra frostsufer'.
Ne eblas por mi iri, nek sidi plu mi povis.
Al vi altrenas, puŝas ĉiu er'.

Kiel hundino idon, mi tenas vin enbuŝe
por kuri kun vi for de la minac'.
La jarojn, disrompintajn la sorton ŝtalotuŝe,
sur min ŝutegas ĉiu hor' sen lac'.

Manĝigu min malsatan kaj kovru min en frosto.
Mi tiom stultas sen via zorgem'.
La vent', se vi forestas, trablovas min ĝis osto.
Nur diru — kaj forlasos min la trem'.

Se min vi alrigardis, jam ĉion mi forgesis.
Aŭskultis vi kaj fuĝis mia vort'.
Per vi mi estu milda, rigora kiu estis;
alfrontu mi, se venas viv' aŭ mort'!

Patrino min forpelis — mi kuŝis sur la sojlo —
mi vane volis min mem kaŝi for —
super mi vaka spaco kaj sube dura ŝtono.
Nur dormi! Frapas mi sur via kor'.

Jen multaj nur vivadas, sen sentoj min similas,
kies okulojn tamen nubas larm'.
Kaj des pli mi vin amas, ke ankaŭ min ekŝatas
mi per la am', per via ama varm'.

El la hungara: István *Ertl*

György BODORKÓS
metalurgia inĝeniero,
ĉefteknologo

Novaj teknologioj en metalurgia fabriko (2.)

2.3 FABRIKADO DE NAFTO-INDUSTRIAJ TUBOJ

Nia entrepreno fabrikas el tiuj tuboj la sekvajn tipojn kaj kalibrojn:

Ŝlimtuboj 4 1/2" — 10 3/4"
Bortuboj 2/38" — 3 1/2"
Pumptuboj 2" — 12", ĉiuj en la kvalitoj API
Spec 5 A kaj 5 AX

La ŝveligon kaj kalibrigon de tiuj tuboj faras la hidraŭla premilo Demag, poste sekvas tajladoj kaj komplementaj manipuloj.

La ŝraŭbigadon de la tuboj plenumas la tub-helic-tranĉatorparo Cri-Dan (mezuroj de 2" — 10 3/4"). La du duonaŭtomataj helictranĉatoroj preparas unu post la alia la konusajn aŭ cilindrajn tranĉojn sur la kruda tubofino. Ili plusendas la tubon al la mufvolvatoro „Resstellini", kiu unue nur alvolvas la mufon, sed poste faras tion laŭ la norme postulita precizeco.

La mufhavaj tuboj estas aŭtomate aldozigataj al la pernumere regebla tubmezura kaj signa aparato „Techint". Ĝi mezuras unuope ĉiujn tubojn — ankaŭ la mufhavajn — pri longo kaj pezo, kaj signas ilin laŭ la preskriboj de la normo.

La signitajn tubojn en alia aparato ŝutiloj kovras per lako „kumarol" por igi ilin korodrezistaj. Post tio oni faskigas la tubojn sur stabloj por livero.

La mufojn oni fabrikas el tuboj varme laminitaj sur la meza kaj la granda laminatorlinioj. Tiujn tubojn dispecigas duonaŭtomata maŝino „Cri-Dan" por havi mufojn en mezuroj de 2" — 10 3/4". La helictranĉadon plenumas laŭnumere regata aŭtomata muf-helictranĉatoro; la pretaj mufoj post kontrolado pasas al la survolva maŝino.

2.4. SENSTAMPILA FORĜADO

Parto de la ŝtalmuldaĵoj en la Senstampila Forĝuzino estas formata al diversaj profilaĵoj, precipe por la propraj celoj, i.a. por kontentigi niajn bezonojn pri stango- kaj blokformaj instrumentoŝtaloj.

2.5. PERMATRICA FORĜADO

La entrepreno jam de la jarcent-komenco faras tian forĝadon. En la jaro 1960 ni establis maksimum-premilegojn, kiuj estas jam regantaj en nia forĝejo. Ankaŭ la truadon kaj la fajladon (senbavurigon) plenumas jam mekanikaj premiloj.

La permatrica forĝado okazas laŭ la fazoj: dispecigo — ardigo — premado — truado-fajlado — purigo de la surfaco, apretado (kalibrigo, glatigo, ktp.).

Kiel materialo por niaj permatricaj produktaĵoj, servas varme laminitaj, originalaj aŭ ŝlifitaj ŝtonblokoj kaj stangoj. La ŝtonblokojn dispecigas aŭtomate dozigaj mekanikaj tranĉilegoj laŭ la komence bezonataj pezo kaj dimensio. La mekanikaj ĉizojoj fabrikitaj de Caddy kaj de Erfurt zorgas pri la necesa tranĉ-surfaco. Depende de la kvalitoj de la varo, ni aplikas tranĉadon en malvarma, mezvarma (400 °C) kaj varma (800 °C) temperaturo. Indukcia instalaĵo de tiristoraj transformatoroj ardigas la pecojn je la temperaturo de la forĝado (1050 — 1150 °C). Tiuj instalaĵoj estas facile enigeblaj en la fabrikan procedon, ebligas puran ardigon kun malmulte da oksidtavolo.

La ardigitajn pecojn forĝas permane regataj maksimum-remiloj. Estas farendaj tie kvar bazaj operacioj: forigo de la oksidtavolo, divido de la materialo, forĝado ĝis la preta formo kaj forigo de la superfluaĵoj.

Fabrika komplekso estis disvolvita — kiu forĝas sen homa interveno — el forĝpremilo de 2500 tunoj (LZK) kaj ŝlifpremio de 315 tunoj (LDO) kun la aldonitaj aŭtomata dozigilo por 50-90 mm-aj profilaĵoj kaj robotmaŝinoj de tipo ATR, HS-100, respektive HD-100. Zorgi oni devas sole pri la kompletigo kaj kontrolo de la dozigilo.

Kvankam la roboto climinas la korpan laboron, tamen ili metas kelkajn antaŭkondiĉojn al ni. Pro tio estas avantaĝe fabriki matricajn varojn, se oni disponas pri:

— granda serio,
— relative granda popeca pezo,
— ne pli ol tri operacioj sub la forĝilo,
— sekure kapteblaj preformitaj kaj pretaj pecoj (per simplaj artika tenajlo kun makzelo),

— en la ingojn facile enigebla forĝota peco (konusecaj),
— je lubrikaĵo relative indiferenta peco.

Kompreneble oni devis plurrilate precizigi, respektive ŝanĝi la antaŭan teknologion. Ni mencias tiurilate la pre-strecite konstruitan maksimum-forĝpremilon de 25 mN, kiu havas suban kaj superan elĵetilojn kaj duoble-kejlan akceptejon. Tiel la martelbloko estas kun plia mezurprecizeco ĝustigebla.

Menciindas same la duaga mekanika forĝpremilo, kiu ebligas tre ekonomiajn procedojn. En ĝi laboras du martelblokoj, inter si certagrade ligitaj, tamen kun tre diversaj movdiagramoj. Ilia premforto estas 5-5 mN. La mezurprecizeco preskaŭ atingas la precizon de la matricoj. Tiamaniere produkteblas precizegaj pecoj apenaŭ fajlendaj, en maso de 0,5 — 2,5 kg, kun eta allasaĵo. Ĉe tiu procedo la ŝparo de materialo atingas 25-40 procentojn.

Certe, la matric-farado estas komplika kaj pli kosta ol kutime. Tamen indas ĝin apliki en specialaj kazoj kaj por grandaj serioj kun altkostaj materialoj, kies eviteblaj perdoj kompensas la matrico-koston. La deziratan teksturon de la tuboj ni prizorgas per regulata fridigo aŭ per termomanipulado sur agregato Nassheuer. La restintan oksidtavolon forigas poste poldevenaj mekanikaj aparatoj per grajnoŝutado. La mezuroj de la matricoj estas kontrolataj unue per plasta muldado, tre precize.

2.6. FABRIKADO DE PREMITAJ ŜTALBOTELOJ

Depost la 20aj jaroj ni fabrikas ŝtalbotelojn, kaj de 1938 jam ni aliris al la premitaj ŝtalboteloj. Dum la premado en la unua fazo estas truita la peco, kaj en la sekva fazo oni etendas la truitan tubaĵon. Kiel materialo uzatas varme laminita ŝtalbloko farita per vaku-metalurgio (kvalito de Cr 135 P). Frotpremilo dispecigas ĝin je la deziratej longoj. Post ardigo en gasforno, 1000-tuna forĝpremilo prilaboras ĝin tubaĵo (ingo) kun vandodiko de 15 mm. Post fajlado kaj reardigo ĝi estas etendita en 235-tuna vertikala hidraŭla premilo, helpe de tirringoj, reduktaj kaj glatigaj rumuloj finfine je tubo kun vandodiko de 5 mm.

La vandodikon kontrolas aŭtomata izotopmezurilo. La etendadon sekvas la primara hardigo, kaj la kalibrigon finas la surfiksado de la buŝparto, pere de laŭcela ilo, ree hardigo je temperaturo de 600-660 °C. Post pluraj finpretigaj laboroj la boteloj estas pakataj kaj liverataj. La moderna teknologio de tiu etendado diferencas de la tutmonde aplikataj metodoj.

2.7. FABRIKADO DE ŜTALBLOKOJ KAJ RONDŜTALOJ

Nia ŝtalblok-fabrikado funkcias tre elaste utiligante diversgrandajn kaj formajn aĉetitajn muldaĵojn. La duonaŭtomataj polurmaŝinoj havas abunde da kapacito por fabriki forĝotajn specialajn materialojn ankaŭ por la veturilo-industrio, en konvena kvalito de la surfacoj.

Por tubofabrikado oni produktas ankaŭ rondŝtalojn kun diametroj de 105-160 mm. La tiucela laminator-linio konsistas el modifebla triobla laminatoro (O 850 mm) kaj el la aligataj du laminiloj (O 640 °C).

2.8. FABRIKADO DE VELDITAJ TUBOJ

Kiel konate, por la industria tubofabrikado estis mejloŝtono la patento de C. Whitehouse en la jaro 1825, pri faldata tubo veldata sur tirbenko. La tiel fabrikitaj tuboj estis taŭgaj por konduki akvon kaj gason. Jarcentkomence ekregis la senjuntaj tuboj. Dum la tiucelaj procedoj disvolviĝis, ankaŭ la kontinuaj larĝbendaj maŝinlinioj kaj la veldteknologioj disvastiĝis, ebligante modernan kaj ekonomian fabrikadon de velditaj tuboj. Post la dua mondmilito ni ekfunkciligis la unuan laŭlonge veldantan aparaton, kaj en la 60aj jaroj denove du veldaparatarojn, produktaĵojn de Innocenti kaj de Perkins. Ambaŭ laobras per altfrekvenca indukta veldtekniko (250 kHz).

La uzata materialo estas lamenoj, varme kaj nevarme laminitaj. La velditaj tuboj estas produktataj por senpera utiligo kun simpla finaĵo, ankaŭ kiel materialoj por nevarme tiritaj tuboj; por akvoduktoj kaj similaj utiligoj zinkite kaj elictranĉite.

Triono de la velditaj tuboj estas uzataj zinkizite. Tio nevesigas kemian preparadon, post kiu aŭtomata zinkizilo (Körner) kovras la tubon zinka. Ĉiuj tuboj alvenas poste en la

apretejon por ilin glatigi, helictranĉi, farbi, eventuale surfiksi mufon. La rektigatoro „Kiesserling" estas kvinruluma hiperboloida maŝino; aŭtomata instalaĵo de tipo Cosfeld faras la helican tranĉadon, la surŝraŭbigon de la mufo kaj la farbigon de la superfluaj helicoj. Fine en la magazeno sur laborrubando oni faskigas ilin, helpe de permanaj pneŭmataj iloj, antaŭ la livero.

2.9. FABRIKADO DE NEVARME TIRITAJ TUBOJ

Nevarme tiritaj tuboj estas uzataj precipe tie, kie varme tiritaj tuboj jam ne kapablas kontentigi la postulojn pri surfaco, formo kaj mezurtolerancoj. La kreskintan bezonon por tiaj tuboj kaŭzis la forta disvolviĝo de la maŝinindustrio, la fabrikado de veturiloj kaj de aviadiloj. Por servi al la pliaj bezonoj kvalitaj kaj kvantaj, la entrepreno aldone establis grandkapacitajn instalaĵojn laŭ Kiesserling-patento. Nuntempe estas produktataj tuboj kun ekstera diametro de 4—120 mm, kaj kun vandodiko de 0,5—10 mm, kun kaj sen junto. La tiaspecajn velditajn tubojn utiligas la meblo- kaj instrumentoindustrioj, krome pli kaj pli ankaŭ la veturiloindustrio pro la granda solideco.

El la varme-laminitaj senjuntaj tuboj estas produktataj pere de unu aŭ pluraj nevarmetiradoj

- brile tiritaj tuboj,
- senokside malharditaj kaj
- normalizitaj tuboj.

2.9.1 Teknologiaj procedoj dum nevarme-tirado

a) Pintigo: por formi kolon sur unu tubofino, kaj tiel ebligi al la tirilo kapti la tubon.

b) Borado: oni devas trui la tubon por malebligi rompiĝon kaj akcidenton pro la interna vakuo kaŭze de la tirado.

c) Tanado: oni devas senoksidi la tubon ekstere kaj interne por igi ĝin „metalpura".

d) Fosfat-ŝmirado: per mergado en emulsion kreiĝas zinkfosfat-lubrikaĵo.

e) Trempado: dum tiu la zinkfosfato transformiĝas pro natrona emulsio je zinkstereato, kiu ebligas pli bonan glitadon dum la tirado.

f) Tirado: la tubo estas tratirata, ĉu per tir-ringo, ĉu ankaŭ per interna cilindra ŝtopilo.

Plej ofte ni faras perŝtopilan tiradon. Laŭ la *Fig. 8.* tiam la konuso de la ŝtopilo deinterne subtenas la tubovandon, dum la transformado fare de la ĉirkaŭanta tirringo.

Post la supraj laborfazoj oni devas ripeti la trempadon en la natronan emulsion kaj poste la tiradon. Sekvas termomanipulado laŭ la tubokvalito. Estas tuboj, ĉe kiuj la supran proceson oni plurfoje ripetas, ĝis oni atingas la finajn dimensiojn.



Fig. 8. Tubotirado per ŝtopilo

3. TEKNOLOGIAJ DISVOLVOJ
3.1. PRINCIPOJ DE LA DISVOLVADO

Oni devas konsideri kiel elirbazon la aktualan fabrikadon de la varme laminitaj senjuntaj tuboj, kaj plani laŭ tio la bezonatajn novigojn:

— krei fermitan laborciklon, enigante ankaŭ la transportadojn,
— malpliigi la produktantajn uzinojn ĝis 2-3, kaj levi iom la produktatajn kvantojn de la nuna varogamo,
— anstataŭigi la etajn kaj maldikvandajn — ne specialajn — tubojn per velditaj, varme reduktitaj tuboj.
— igi pli elasta la provizadon de krudmaterialoj, tiucele forte malpliigi la gamon de la bezonataj dimensioj,
— nepre akomodi la establotan tubofabrikmetodon al la reale riceveblaj krudmaterialoj,
— establi la fabrikadon de la velditaj, reduktitaj tuboj lige kun la senjunta tubofabrikado.

Post ties efektivigo estos eble vaste renovigi la nevarmajn procedojn de la tubofabrikado. Se la necesajn krudmaterialojn ne eblos grandkvante aĉeti muldite ĉe la enlandaj entreprenoj, tiam ni devos tion prizorgi interne de nia vertikala fabrikado.

3.2. ENKONDUKOTAJ NOVAJ TEKNOLOGIOJ

3.2.1. Ŝtalfabrikado.

— UHP-forno kun vakua oksigena-argona procedo, kompletigata kun kaldronmetalurgio, aŭ alia UHP-procedo.
— Horizontala kontinua fandejo por granddiametra rondmuldado.
— Kontinu-kurenta arkluma forno (malpli brua).
— Konvertero, konsumanta sole rubferon, blovata kaj supre, kaj sube, ankaŭ per oksigeno kaj tergaso.
— Aŭtomata enigado de alojigiloj kaj senoksidiloj en la kaldronon de la nunaj elektrofornoj, eventuale ankaŭ ĉe la novaj ŝtalfornoj.

3.2.2. Fabrikado de varme laminitaj senjuntaj tuboj.

En tiu rilato ĉirkaŭ dek tubofaraj procedoj estas disvastiĝantaj en la diametroj de 20-1100 mm. Apud la kutimaj laminaj procedoj, la novaj (PSW kaj CPE) procedoj, kombinataj kun transverse-laminanta truado, havas fortan avantaĝon ebligante multe pli elaste direkteblan fabrikadon.

La procedo PSW (Planete-oblikva-laminado) laboras per tri konusaj cilindroj, kuŝantaj oblikve, inter si en angulo de 120 gradoj. La cilindrojn movas planetrada mekanismo, kune kun oblikva truatoro kaj redukta maŝinlinio, la instalaĵo servas kvazaŭ duonkontinua tubofabrikilo.

Avantaĝaj estas i.a. la elastaj ebloj por ŝanĝi la cilindrojn kaj la mandrenon, la granda tubolongeco, la energioŝparo kaj la granda etendeblo. La plej malgranda produktebla dimensio estas O 50x3 mm. Per tire-reduktado eblas produkti eventuale eĉ diametrojn de 1/2".

La procedo CPE laboras kombinite per ŝovbenko kun transversa laminado. La ŝovbenko etendas la tubon laminitan en oblikva laminatoro. La avantaĝoj estas similaj al la supre menciita procedo, tamen ĝi bezonas pli da loko, pli da investaĵo, kaj ne estas kunigebla kun reduktado.

3.2.3. Fabrikado de veldtuboj.

Estos inde enkonduki la nevarme-reduktadon — por diametroj de 8-30 mm — kiu sekvas la veldadon. Tio anstataŭos la kutiman varme-reduktadon post veldado. Fabrikante naftortubojn kaj kaldronego-tubojn oni prefere aplikas la pluevoluigitan rezistanc-veldadon ĉe etaj diametroj. Pli konvenaj ŝajnas al ni kelkaj kvaliton plibonigaj operacioj ĉe la altfrekvenca indukta veldado. Tiuj estas inter aliaj:

— ultrasona kaj magneta kontroladoj de la junto,
— aŭtomata kontrolado de tubodimensioj, kaj ties registrado,
— eksperimentoj por forlasi la feritkernon.

3.2.4. Nevarma tubofabrikado.

Apud la aplikata nevarme-tirado, ni volas enkonduki la teknologion de la nevarma pilgerlaminado. Tio ebligos i.a. pliigon de la tir-rapideco per hidrodinamikaj tiriloj, uzon de ultrasona vibrigo, termomekanikaj, resp. kontinuaj termomanipulatoroj, indukciaj hardigaj-malhardigaj fornoj, krome duonvarman kaj nevarman formigon sur PSW-instalaĵo.

El la venontaj disvolvoj de tiu gravega ŝtalindustrio ni konigis nur skize kelkajn teknologiajn ideojn, kiuj ŝajnas aplikeblaj kaj realigotaj.

Trad.: Ervin *Fenyvesi*

Miyamoto masao:

OMAĜE AL MAJO*

Vespero jam falas. Nia aŭto kuras kaj kuras, mi mem ne scias kien, mi konfidas ĉion al la kamaradoj. Malsame al Osako, miadezerta urbo, Pekino havas grandan longan rektkuran aleon kun sombraj arboj. Ĉu poploj aŭ salikoj; ŝajne ili restas ĉiel indiferentaj, kaj mi ne povas certiĝi en la kuranta aŭto.

— Ĉu tiu... ne „Volgo"? — mi rimarkas la rusliteran skribon sur la aŭto.

— Jes... de Sovetio.

— Ĉu?

Mi silentas, la kamaradoj ekkantas samtempe, mi ne rimarkas, kiu la unua. Liu Ling, Zhang Haiping kaj Li Shijun gaje kantas. Ili venis al la flughaveno por min akcepti. La melodion mi tre bone konas: *Burlaki na Volge* (Ŝiptrenistoj sur Volgo), sed mi ne sekvas, ne povas sekvi, ĉar mi ne parkeras la tekston, kaj

Ej, ruk ruk! Ej, ruk ruk!
Marŝas ni la bordon nun,
kaj ni kantas al la sun'.
Ajda da ajda! Ajda da ajda!
Kaj ni kantas al la sun'.

Vesperas majo. Kuras „Volgo". Jes, mi venas la landon, la unuan respublikon de Azio, la unuan socialisman landon de Azio. Mi vidos propraokule, kia estas ĝia socialismo, kia estas ĝia respubliko.

* * *

Nebulas posttagmeza estuaro, la estuaro de la rivero Huangpu. Nebulas la maro, ne videblas horizonto. De ie sirenado, de la fora maro. Mi staras sur zono laŭrivera, kiun iam imperiistoj nomis sialingve „Band". La granda ponto, sistempe nomata Garden Birdge staras malantaŭ mi, ne malproksime. Mi scias, trans tiu ĉi ponto iam troviĝis la koncesiitaj kvartaloj. Nun kelkaj junuloj ĉi tie vigle kaj takte sin movas, ili ekzercas sin per „tajgiĉuano".

Ĉu Verda Majo
ĉi tien surlandiĝis?
— Huangpu'a kajo.

Mi devas konfesi, ke ĉio ĉi estas nur fikcia, mi ne scias nek demandas, kien ŝi surlandiĝis en 1937, kaj kie sin kaŝis.

Oktobre en 1930 Oosugi Sakae, japana anarkiista ĉefo kaj pioniro de la Esperanto-movado, atingis ĉi tiun havenon ŝtelire el sia lando, por ke ĉi tie li parolu kun Li Dunghwi, revoluciulo, komunista membro de la Korea Provizora Registaro establita ĉi tie, kun Chen Duxu, la unua ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj kun Gregorij Vojtinskij, komisiito de Kominterno, veninta el Sovetio. Ili havis la Konferencon de la Ekstrem-Orientaj Socialistoj ĉi tie; mi scias, kie ili kunsidis, sed ĉifoje...

En ĉi tiun urbon venis iam Zamaga Taizi, japana anarkiisto kaj esperantisto, por helpi la eldonon de „La Voĉo de la Popolo" kontraŭleĝe presitan en koncesiita kvartalo. Sifo, ĝia redaktoro kaj administranto kaj presisto jam suferis pulman karcinomion tiutempe. Li mortis post nelonge, sed lia gazeto estis la unua anarkiista kaj esperantista periodaĵo en la historio de Ĉinio.

* * *

Ĉi tien iam venis Vasilij Eroŝenko, kaj indignis antaŭ la avizo ĉe la enirejo de parko: „Ĉinoj kaj hundoj ne rajtas eniri". Kun larmoj el la nevidantaj okuloj li prikantis la malfeliĉon kaj esperon de la Aziaj popoloj. Mi ne scias, precize kie li ploris sian maldolĉan ploron.

* * *

Serenas la parko Hongkou. Mi demetis la ĉapon antaŭ la statuo de mia granda instruisto, jes granda por mi kaj por ĉiuj Aziaj popoloj. *Lusin* li sin nomis.

Iam en la parko orgojlaj japanaj generaloj, admiraloj kaj koloniistoj havis sian jubilean solenaĵon pro malgranda venko super ĉinoj. Kaj eksplodis bombo, mortis generalo, vundiĝis multaj oficiroj kaj aliaj, inter kiuj Sigemitu Mamoru, pliposta ministro pri eksterlandaj aferoj, li estas konata pro la perdo de kruro. La teroristo estis koreo, sin nomis Yung Bongkil, kaj estis ekzekutita.

En ĉi tiu urbo iam laboris Kominterno. Ĝiaj aktivuloj estis diversnaciaj, el ĉiu mondparto alfluis ĉi tien revoluciuloj. Inter ili ankaŭ Richard Sorge. Li siatempe amikiĝis kun Agnes Smedley kaj Ozaki Hotumi. Ili kune batalis por bari la minacan krizon de la mondmilito. Kaj ĝuste pro tio Sorge kaj Ozaki poste en Tokio ricevis pendumilan maŝon.

Multaj-multaj koreoj, japanoj kaj aliaj venis tien ĉi, kaj la urbo fariĝis krisolo aŭ bedo de

la Azia revolucio. Tra tiu ĉi urbo multaj iris norden, al Vladivostoko, al Ulanbatoro, kaj tra ili al Moskvo, kiu estis la stelo de la idealo, jes, tio ĝis estis...

Mi staras antaŭ duetaĝa domo sur strateto de tiu ĉi urbo. Ĉi tie iam sidis la centro de Ŝanhaja Esperanto-Ligo. La pordo estas fermita, tiel ke Xian Sijia, Wang Minhao kaj mi ne povas eniri, sed mi povas imagi al mi... Antaŭ 50 jaroj en ĝia malvasta ĉambro viglaj junuloj kunsidis, gaje diskutis, ridoj eksplodis. Inter ili troviĝis Ĵelezo, Chen Qicheng kaj... ankaŭ nia Verda Majo. Ĉi tie ili iam redaktis „La Mondo"-n, multobligis „Ĉinio Hurlas", alvokis: „Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio". Tuj baldaŭ ektondris kanonoj japanaj minace kun dentegoj avidaj... Jes, Ĉinio hurlis, sed... nun estas la vico, japanoj devas hurli, sed mi scias, japanoj ne hurlis, nek hurlos, ĉar...

* * *

Sur la pavimon de la Nankin-strato falas delikate silka pluveto. Nimbuso proksimas minace super la sombraj aleaj arboj, kiuj malsame al tiuj de Osako, preskaŭ kovras la straton, ili karesas mian kapon. Homoj iras sin puŝante antaŭen, sed ili neniam rapidas, samkiel la aŭtoj preterirantaj, kiuj por japanaj okuloj aspektas nur rampantaj.

Vesperas Ŝanhajo.

— Ĉi tie iam ĉinaj strikantoj el japana ŝpinfabriko manifestaciis, kaj anglaj policanoj pafis ilin...

De apude la juna Wang alparolas min. Ha, mi memoras, jes, mi jam trovis afiŝojn du aŭ tri: Mitingo por la datreveno 60a de la Tragikaj Okazaĵoj de la 30a de Majo. Hodiaŭ...? Ha, mi ne havas tempon, mi devos flugi al Pekino morgaŭ matene.

Sub majaj pluveroj agrablaj al la vangoj mi kaj Wang reiras al la hotelo tra la Urumqi-strato. Morgaŭ mi revidos Benczik kaj la aliajn.

Mi amas Ŝanhajon, kiu, dank' al la ironia sorto, per siaj koncesiitaj kvartaloj servis multe por la bono de la Aziaj popoloj.

*En majo de 1985 okaze de la 35 jara jubileo de EPĈ Miyamoto vizitis Ĉinion — tiu vizito inspiris la jenan verkon.

Hugo von Hofmannsthal:

BALADO DE L' EKSTERA VIVO

Kaj idoj kreskas kun profundaj lumoj,
Nenion scias, kreskas kaj forpasas,
Kaj tiun vojon iras ĉiu homo.

Kaj fruktoj jam ekdolĉas kaj amasas
Kaj falas nokte, kiel birdo, morte
Kaj kuŝas iom, sin moliĝi lasas.

Kaj ĉiam blovas vent', kaj ĉiam sorte
Aŭdiĝas kaj diriĝas multaj vortoj,
Kaj sentas ĝuon, lacon ni enkorpe.

Kaj stratoj kurastra la herb' kaj kortoj,
En kiuj torĉoj, arboj, flakoj aras,
Minacas, kaj mortece sekaj fortoj...

Kial estiĝis tiuj ĉi? kaj paras
Neniam ili? kaj estas limo?
Kio la ridon, ploron, palon faras?

Ĉu gravas por ni ludi per ĉirimo,
Kiuj ja grandaj en eterna sol'
Erare vagas al neniu fino?

Ĉu gravas vidi samon eĉ en aro?
Kaj tamen multo sonas en „vesper' ":
El ĝi profunda tristo fluas for,
Kiel mielo densa el ĉelaro.

El la germana: István *Ertl*

Mihai Eminescu:

NOKTON BONAN
(Somnoroase pasarele)

Eĉ birdeto jam dormema
serĉas neston ombre dronan
sur la branĉo ek-ektrema —
Nokton bonan!

Nur de l' fontoj mildas ĝemo
dum arbaro nigras lace;
dormas floroj en ĝardeno —
Dormu pace!

Cigno ŝvebas tra kanejoj,
serĉas neston kviethavan —
vin proksimu la anĝeloj!
Sonĝon ravan!

Sin la bela luno levas
sur la mondon sonĝaroman,
harmonie ĉio revas —
Nokton bonan!

El la rumana:
Imre *Szabó*

Ovid Densusianu:

SUR LA KAMPOVOJO

Sur la kampovojo
nun tri ĉaroj kunas,
la ĉaristoj fajron
bruligante fumas.

Diras la unua:
„Ni en urbo estis
pro la heredaĵo,
sed nenio restis."

La alia: „Torĉon,
ĉerkon mi ekhavis,
mian solan filon
la forstisto pafis."

Jen la tria: „Miaj
bovoj du ŝatataj
pro imposto morgaŭ
estos aŭkciataj."

Ekas jam la ĉaroj
sur la kampovojo,
kvazaŭ ŝtonŝarĝitaj
knaras kun malĝojo.

El la rumana:
Imre *Szabó*

Aleksej Borisoviĉ Ĵuravlov (1956–)



Sonetkrono

1

Ĉu serĉas oni sencon en delir'?
Vi sen mediti svingas per la mano:
Stultaĵojn diras jam plenaĝa vir'.
Jen estas ŝercemulo! Jen profano!

Jes, komprenebla estas via mir',
Se temas pri deliro de malsano,
En ties vort0kirla oceano
Nek peto esprimatas, nek dezir'.

Sed en balbuto de amanta par'
Dominas senco ĉu? Apenaŭ! Ĉar
Por ili plej valoras emocio.

Deliron portas la amorinflam',
Sed ĉu ekzistas senco en la am'?
Senlima estas tiu ĉi nocio...

2

Senlima estas tiu ĉi nocio:
Por iuj homoj vera ideal',
Por iuj – vort' bizara aŭ banal',
Trezor' anima, senutila scio –

La amo korbruliga. De l' pasio
Kaj la prudent' eternas la batal'.
Se en la kor' frenezas incendio,
La cerbo estas de la kor' vasal'.

Plen-plenaj de adoro kaj amor',
Nur bonon ŝparas homoj en memor' –
Spegulo kurba estas la pasio.

Pereas amo en prudenta gel':
La kora voĉo estas bagatel',
Se gravas senc' de la konversacio.

3

Se gravas senc' de la konversacio,
Vi intervenu, ne detenu vin.
Utilos viaj scioj kaj rutin'
Kaj estos grava via opinio.

Dum vivas vi kaj ordas la konscio,
Por via scivolem' ne estu fin'.
Se en la mond' ekzistas vana scio,
Kulpas la mondo mem havanta ĝin.

Se vin mensogos iam viaj sensoj
Kaj en la kap' neniaj estos pensoj –
Esperon havu, venos la inspir'.

Se ne disponos vi jam eĉ moneron –
Sopiro vantos, ja, por diri l' veron,
Ne havas eĉ senceton la sopir'.

4

Ne havas eĉ senceton la sopir'!
Antaŭen tiru min ventplena velo!
Bruegas, pompas viva karuselo,
Jen estas ĝi areno, jen foir'.

Sed junulinoj! ... Tent'! Juneco! Belo!
Hontemo? Pli kuraĝe, kavalir'!
Ja fine falos ĉia citadelo,
Se estos tutkonvena la aspir'.

Kaj ili falas... Nin favoras fat'!
La sentoj bolas en la ambeat',
De l' kora flam' degelus eĉ glacio.

Sed jaroj pasas. Feblas nia flam'.
Kaj la edzinon ni elektas jam –
La sentojn – for! Ekregu la racio!

5

La sentojn – for! Ekregu la racio!
Deklaro jena modas, sed blasfem'
Neniam rompos ĉarmon de l' poem',
Kaj min ne kaptis moda tradicio.

Mi amis kaj amata estis mem...
Apenaŭ nune kredas mi je tio!
Pasinto ŝtelis ĉion. Pri la tem'
La koron ŝiras ĉiu ajn mencio:

La am' sen komprenemo kaj tolero
Malpeza iĝis kiel lanugero,
Forportis ĝin flugiloj de zefir'.

Riproĉoj malutilas, vanas flato,
Kaj sortan baton sekvas nova bato,
Kaj muta estas la poeta lir'.

6

Kaj muta estas la poeta lir',
Dum fajras sunsubiro delikata.
Ne hastu, la momento porbeata,
Prokrastu la foriron! Por admir'

Ne multon cedas l' tempo
senkompata:
La suno kaŝas sin. Ventet-suspir'
Murmuras milde freŝa, aromanta.
Kaj venas nokt-sorĉisto, nokt-fakir'.

Penetras ĉien de l' natur' parfum',
Lampiroj ekbriletas en mallum',
La koron ravas de la nokt' magio.

Kaj amaj vortoj sonas en silent'...
L' racio stultas, regas ja la sent',
Elkora flustr' impresas pli ol krio.

7

Elkora flustr' impresas pli ol krio,
Trafante al profundo de l' anim'.
Foj-foje ĉarmas nekorekta rim',
Esceptojn scias ajna kriterio.

Nun regas en la viv' la teorio!
Reguloj jenaj indas por estim':
Neseriozas ŝtorm' en akvario,
Meritas venĝon ĉiu ajn viktim',

Neniam arbo estas nura ligno,
Troveblas ĉio krom perdita digno,
Inform' dubinda estas onidir',

Sen far' parolo estas nur babilo,
Pli dolorigas vorto ol pafilo,
Pli pikas la rigardo ol rapir'.

8

Pli pikas la rigardo ol rapir'
Kaj peze falas vortoj kiel brikoj.
Hieraŭ ĝuste estis ni amikoj,
Nun estas ni „aĉulo" kaj „vampir'."

Sed kiel ekis tiu „kruca ir'? "
Iome troaj estis vinkalikoj,
Ofenda ŝajnis iu onidir',
Nekontentigaj – de l' amik'
eksplikoj...

Post reciprokaj pikoj kaj riproĉoj
De la animoj ekaŭdiĝas voĉoj,
Forflugas la kverelo kiel jet'.

Kaj forgesiĝas la ofendoj ĵusaj,
Puriĝas la ĉielo de nimbusoj,
Emociiĝon ŝanĝas la kviet'.

9

Emociiĝon ŝanĝas la kviet'.
Ankoraŭ unu tago pasis kure.
Kaj adiaŭas arboj ĝin susure
Post la fenestroj de la kabinet'.

Horloĝo batas laŭte nenature,
Aero freŝa fluas de l' giĉet'.
Vizioj strangaj vagas enobskure,
Fragile lantas ties menuet'.

En malproksimo restis viva prozo.
Uzante la eblecon por ripozo,
Volumoj dormas sur la librobret'.

Malgrandas ĉambro por la soraj revoj,
Ja ŝvebas ili kiel maraj mevoj –
Ĉe skribotablo sidas la poet',

10

Ĉe skribotablo sidas la poet',
Kaptita de ideoj kaj medito.
Atendas vane lin la mola lito,
La tablo tenas kvazaŭ la magnet'.

Kaose multas vortoj en malnet',
Sed ĉiu estas ŝajne parazito.
Kaj cigaredon sekvas cigared',
Kaj celas la rigard' al infinito.

La ventan ploron, varmon de la sun',
Kunfandas la poet' penema kun
Fervoro, pacienc' kaj sinfordono.

Li filtras la miksaĵon tra la kor' –
Kaj obeanta jam al la aŭtor',
Silenta penso iĝas vorto, sono.

11

Silenta penso iĝas vorto, sono...
Bruegas, hurlas la ĉirkaŭa mond',
Bruondon preman sekvas nova ond':
Radi', televidil', magnetofono,

Aviadiloj, tramoj, telefono...
Nek voko kompreneblas, nek respond'!
Sur tia grandioze laŭta fono
La vivo ŝajnas prisorĉita rond'

Kaj ni – sciuroj, en la rond' kurantaj,
Kaj fortoj niaj – feblaj, agoj – vantaj,
Penetras ĉiun poron bru-venen'.

Nur post la noktomezo gaje-stulte
Ni ĝuas la silenton, sed nemulte:
Helruĝe ekradias jam maten'.

12

Helruĝe ekradias jam maten'.
Sin kaŝas haste sonĝoj en angulo.
Tiktako de horloĝo – kiel lulo,
Ja kiom logas, tentas la kusen'.

Eliru el la hejmo vi, dormulo,
Rigardu al miriga fenomen':
Timeme montras sin el-sub nebulo
Rivero, kvazaŭ dormus sub kurten'.

Jen flirtas arbokronoj kiel flagoj,
Varmetas de la sun' radio-sagoj,
En ĉio regas paco kaj kompren'.

Kaj silentiĝas tuta Universo.
Naskiĝas rimoj, ekaperas verso...
Vi helpu la poeton, Muza ben'!

13

Vi helpu la poeton, Muza ben',
Dum li atakas kiel idioto
La gazetaron. Tiel Don Kiĥoto
Atakis muelejojn. Vana pen'!

Esperojn rompas redakcia loto.
La sama ripetiĝas ĉie scen':
„Jen estas la poemoj, jen la fotoj.
Ĝis la revido." „Senrezulte?..."
„Sen..."

Kaj restas nur: post la kurada van'
En sia ĉambro kuŝi sur divan',
Sen ajna penso gapi al plafono

Kaj firme kredi: helpos al sukces'
Insisto, pacienco, sinforges',
De la raci' kaj sentoj unisono.

14

De la raci' kaj sentoj unisono...
Ĉiama, sankta revo de la Hom',
Feliĉon portus ĝi al nia dom'
Kaj nia viv' similus al kanzono.

Impetas ni al famo kaj renom',
Ĉe ni abundas fortoj, nervoj, kono.
Sed ofte ĉio estas nur fantom'!
Ekzemplo tujas: de l' sonetoj krono.

Ja diras vi: la krono iom strangas,
Ĉi tio lamas, tio tute mankas,
Ĝi nek liriko estas, nek satir'.

Responde donas mi la referencon:
Deliris mi (rigardu la komencon).
Ĉu serĉas oni sencon en delir'?

15

Ĉu serĉas oni sencon en delir'?
Senlima estas tiu ĉi nocio:
Se gravas senc' de la konversacio,
Ne havas eĉ senceton la sopir'!

La sentojn – for! Ekregu la racio! –
Kaj muta estas la poeta lir'.
Elkora flustr' impresas pli ol krio,
Pli pintas la rigardo ol rapir'...

Emociiĝon ŝanĝas la kviet',
Ĉe skribotablo sidas la poet',
Silenta penso iĝas vorto, sono.

Helruĝe ekradias jam maten'.
Vi helpu la poeton, Muza ben',
De la raci' kaj sentoj unisiono!

recenzoj

Baza kultura minimumo

Esperanta Antologio. Poemoj 1887-1981. Redaktis William Auld. Dua eldono, reviziita kaj kompletigita. Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1984. 21,5 cm, 887 p. Bindita. Prezo: 60,- gld. (Por Hungario: 700,- Ft)

Iu ajn povas demandi la homojn, esperantistojn kaj neesperantistojn, pri nia originala literaturo aŭ, pli vastasence, pri la internacia Esperanta kulturo. Ĉu vi scias, kiajn respondojn ni ricevos? Sendepende de la esperantisteco de la homoj, duspecajn: la unua grupo subtaksus ĝin dirante, ke Esperanto-literaturo (laŭ ies imagoj sekve kulturo) entute ne ekzistas, la dua grupo entuziasmegus troigante, ke Esperanto havas vastegan verkaron (sekve ĝia kulturo superas ĉiujn entute ekzistantajn naciajn kulturojn). Ambaŭ opinioj estas tre danĝeraj, kondukantaj al pasivismo. Bedaŭrinde nur malmultaj havas la eblon trarigardi nian propran trezorejon, ĉar mankas la bazaj inventaraj kolektaĵoj, kiuj povus servi kaze de nia movado iel simile kiel persona legitimilo ĉe civitanoj. Estas tre ĝoje, ke alsojle de la centjariĝo enmanigas al ni tia kultura identigilo kiel la ampleksa Esperanta Antologio redaktita de William Auld. Tamen, krom ĝoji, mi iom amaras konante la kutimajn eldonkvantojn de Universala Esperanto-Asocio ĉar verŝajne tre multaj en la mondo ne havas la bezonatajn financojn por povi ĝin aĉeti.

Estis jam tempo prepari novan antologion de versaj originalaĵoj, ja la ekzempleroj de la antaŭa eldono el la jaro 1958a delonge elĉerpiĝis, kaj intertempe plenkreskis nova generacio, ekestis novaj landaj movadoj eĉ ekster Eŭropo. La manko estis jam preskaŭ maljusta, ja bazaj kulturaj materialoj devas esti ĉiam akireblaj (same kiel vortaroj kaj ceteraj lingvopriskribaj verkoj). Nuntempe ni troviĝas en la epoko de la dua fluo de antologioj. Cetere ankaŭ tiurilate ni povas havi tre interesan rimarkon: en la unua eldonserio de la Esperantigitaj naciaj antologioj la Esperanta havis preskaŭ la lastan lokon laŭ la eldontempo, ĉifoje ĝi estas jam inter la unuaj — kaj mi volonte kredus, ke tio estas dankebla ne nur al la centjariĝo, sed tio pruvas ankaŭ, ke en la tuto de nia literaturo la originalaĵoj iom avancis. Tio montras ja gravan fenomenon: firmiĝis kerno de nia literaturo, eĉ se ĝi surhavas la trajtojn de la diversaj naciaj literaturoj, tio signifas ke la verkantoj en Esperanto ne povas liberiĝi el la naciaj kulturoj (cetere mi eĉ ne asertas, ke nepre estus bone liberiĝi) kaj ili sekvas la naciajn verkmanierojn.

Tiu ĉi afero estas samtempe bona kaj malbona. Malbone, ke tiel multaj epigonoj povas kaŝi sin, (multaj tiaj troviĝas en nia antologio), bone, ke neniu el la naciaj literaturoj havas tiom da vivigaj vejnoj kiel la nia. La daŭra rekta kontakto kun la naciaj literaturoj estas speciale nia propra. Krom tio kaj kaj ĝuste pro tio, mi, traleginte la volumon, povis palpi ion komunan, koheran. En la unua periodo ĉion supersonis la movada liriko; en la dua etapo (post la unua mondmilito) sperteblas ia strebado por akomodiĝi al la naciaj literaturoj (jen la ekzemplo de la du hungaraj granduloj: Kalocsay strebis imiti la renoman hungaran verkistaron ĉirkaŭ la gazeto Nyugat, Baghy eĉ reiris al Petőfi kaj krome verkis kanzone en la stilo de Heltai); dum kaj post la dua mondmilito preskaŭ neniu el niaj verkistoj rimarkis, ke en tiu ĉi tutmonda genocido amaso da esperantistoj estis pelataj ŝafe en la gaskamerojn, kaj antaŭ la murdajn kuglojn, preskaŭ neniu scias pri tio, ke niaj plejbonuloj turnis sin kontraŭ la faŝismo eĉ armile partoprenante la reziston (vidu la ekzpemplon de Szalai, presisto de Literatura Mondo) k.a., tio montras, ke nia literaturo fermis sin en la eburan turon apenaŭ havante iom da kontakto kun la movado tiu ĉi turniĝo al la privataj problemoj ĝis la lasta tempo karakterizas la literaturon. Ekzistas alia — bedaŭrinde malvasta — tavolo, kiu tuŝas la sociajn problemojn, sed ankaŭ ĝia grava parto tro teorie traktas ilin.

Aliflanke, inter la esperantistoj eblas trovi multajn kontraŭliteraturajn argumentojn: Esperanto estas praktika lingvo, do ni devas apliki ĝin, ekzemple kiel la lingvon de la konduktoroj kaj kelneroj aŭ kiel tiun de la altaj sciencoj. Unue mi ne miras pri ili, due mi trovas tre stranga ilian opinion! Ja ankaŭ ili rekonas, ke Esperanto estas universala lingvo, sed kial ĝuste la literaturo estus eksteruniversa? Mankas sinkrona kohereco de nia kulturo. Mankas ĝuste tio, kies mankon montras la difino de PIV, ke kulturo estas precipe spirita, kaj civilizo estas ankaŭ materia. Mankas, ke nia literaturo ne saturas la aliajn movadajn terenojn. Ne ekzistas lernejoj, kursoj, kie oni konsciigus la novajn movadanojn pri la graveco de nia originala literaturo. Eĉ se kelkloke tamen eblas trovi literaturajn kursojn, ankaŭ tie oni montras nur la surfacon. La veraj praktikantoj de la literaturo ne trovas forumojn. Ni konstatis, ke Esperanto estas grafika lingvo, tamen la literaturo — kiel la plej grafika aplikmetodo — apenaŭ havas hejmon en la animo de la movadanoj. Ŝajnas, ke la movado devojiĝis disde la literaturo same kiel ĝi disde la movado. Sed la movadon tamen povos savi nur la literaturo (tio estas mia privata opinio), ĉar tie troviĝas la plej rapide aplikeblaj pruvoj pri la vivkapablo de nia lingvo. (Ja ankaŭ Zamenhof mem ne hazarde aperigis originalaĵojn kaj tradukaĵojn en sia unua libro.) Samtempe ankaŭ la literaturistojn ŝarĝas gravaj kulpoj, ili retiriĝis perdigante la kontaktojn kun la movadaj homoj, kaj ŝajnas — almenaŭ momente — ke la literaturo vagas ie aliloke perdante la celon. Sed laŭ la logiko de la historio ĝi retrovos la celon. La kondiĉo estas, ke kresku la kohereco de la movado kaj kresku ĝia financa potenco — kaj tiel povu ekesti la vivoformo: Esperantlingva verkisto, kiu materiale dependas de la movado, kaj sekve ankaŭ la movadon povos la verkistoj influi pli signife ol ĝis nun.

Estas baza movada postulo senĉese informi la ĉirkaŭesperantistaran mondon pri la realaĵoj ĉiam indikative, neniam kondicionale aŭ optative. Nia literaturo konsistas el faktoj, kiujn ni devas reale montri al la neesperantistoj. (Ĉe la hungara eldonejo Európa aperos en 1987 dulingva antologio de Esperantaj poemoj kaj noveloj. Noto de la red.) Ŝajne la ĝisnuna kontakto inter la Esperanta kaj la naciaj literaturoj estis unudirekta: la Esperanta akceptis preskaŭ ĉion el la naciaj literaturoj pere de la tradukoj, sed inverse tio okazis apenaŭe. La ĉefa respondeco de la Esperantlingvaj verkistoj estas: certigi la egalrajtecon inter nia kaj la naciaj literaturoj. La plej gravaj farendaĵoj estas krei la eblon de la plej vasta selektado: tio estas vaste diskonigi la bazajn konojn pri la verkado (eduki la literaturistojn pere de kursoj, forumoj, renkontiĝoj kaj certigo de taskoj) — tiucele multe gravas, ke la agado esti verkisto fariĝu alloga (la verkmetodoj estu konataj, estu popularigitaj la biografioj de la plej elstaraj literaturistoj) kaj la sekva postulato estas krei objektivan kritikon (apenaŭ aperis io post la fama De paĝo al paĝo de L. Tárkony). La kritiko devas esti plej laŭtempa, ĝi devas respeguli la plej lastajn pretendojn de la komunumo. Ĝi devas re- kaj retaksi eĉ la malnovajn verkojn, kuraĝigi la novicajn talentojn.

William Auld entreprenis la taskon retaksi eĉ nian klasikon. La amplekso de la nuna eldono estas 832 paĝoj (la antaŭa 548 paĝoj), do la volumo kreskis signife. Aperis amaso da polviĝintaj unuaperiodaj verkistoj: mi pleje ĝojas pri Rezső Rajczy, Anonimulo, Eroŝenko ktp, malpli entuziasmigas min la verkoj de Maria Hankel, sed mi rekonas la ordigan principon: montri kiel eble plej vastan panoramon de la fontoregiono de nia literaturo. Ĉiuj kiuj entute verkis almenaŭ kelkajn poemojn, havas histori-

recenzoj

an meriton — ili uzis la lingvon kaj per tio (konvene al la propra talento) ili kontribuis al la vastigo de la bazo, plinombrigo de la parolantaro kaj legantaro. Mi ne asertas, ke la reapero de multaj malnovaj kontribuaĵoj fortigas la volumon. Eĉ male, ili multe malaltigas la averaĝan nivelon, tamen, mi kredas, ke estas grava valoro de la nuna antologio, ke ĝi montras la diakronan kompleksecon de nia literaturo, kaj donas multfacetan bildon pri la iamaj cirkonstancoj, ili montras la gravecon de la plej grandaj. Kiel fulmo trafas nin la rekono: kiom kaj kiom da ebloj neeluzitaj, kiom da talentoj needukitaj, kiom da torsoj — eĉ ne unusola plena vivoverko. Tuj kompreneblas por ni, kiel povis okazi, ke la Zamenhofa liriko abundis kiel konata en la movado. Simple pro du kialoj: li estis ankaŭ movadorganizanto kaj samtempe vere li estis la plej granda en la unua kvaronjarcento (eĉ, spite al la ekzisto de Grabowski). Mi tre ĝojas pro la retaksado ankaŭ de la ĵusa pasinto. Ekzemple la gravaj ŝanĝoj en la poezio de Julio Baghy (aperis finfine la perlo „Post striko") multe helpas klarigi lian iaman sukceson, do, tiu ĉi dua elekto estas pli reala bildo ol la antaŭa. Estas interese, ke Kalocsay restis senŝanĝa. Eble la kritikistojn retenis lia prestiĝo, kvankam estas jam tempo por retaksi ankaŭ lin. Daŭrigante la parolon pri la hungaroj, mi bedaŭras, ke EMBA (Imre Baranyai) ne kompletiĝis — kvankam eble ĝuste li estas la plej granda poeto el la ĵus vicigita hungara triopo. Raymond Schwartz, nia verda koboldo, montras sin nun per grandparte novaj poemoj, sed lia karaktero ne baze ŝanĝiĝis. Geraldo Mattos apartenas al tiuj, kiuj ankaŭ nacilingve estus ĝueblaj, bedaŭrinde ankaŭ li estas malmulte reprezentata.

Transirante al la vivanta klasiko, mi komprenas, ke William Auld kiel redaktoro havis dilemon kiel taksi sin mem. Tre bedaŭrindas, ke li estas malpli prezentata ol li meritus. Eble estus konsilinde en tiaj kazoj, ke iu forigu la respondecon de la redaktoro, alivorte, ke iu alia redaktu lian parton. Min ĝojigas, ke Edwin de Kock jen aperas jam kun 17 poemoj anstataŭ la antaŭaj 2. Same laŭdindaj estas la kompletiĝo de Hilda Dresen, Maŭra, Newell, Jevsejeva, Rossetti, M. Boulton, Chaves kaj Baldur Ragnarsson. Ili montras, ke nia literaturo muskoliĝis kaj estas survoje al la plenkresko. La lasta parto de la libro apartenas jam plie al la futuro kaj esperoj ol al la finiteco. Mi kredas, multaj el la nuntempuloj havas la eblon iam prezenti kompleksan vivoverkon, ja ni trovas inter ili tiajn nomojn kiel Sadler, Miyamoto kaj Ueyama Masao, Goodheir, Mauro Nervi, Balbin, Lister kaj multaj, multaj aliaj, kiuj espereble ne ofendiĝos, ja ne eblas eĉ vicigi tiun amason da nomoj.

Resumante ĉion ĉi, la antologio valoras esti legata kaj uzata eĉ por konsistigi el ĝi nacilingvajn tradukvolumojn. Nepre havinda, ja ĝi estas nia kultura minimumo, kiun devas koni ĉiu esperantisto. Eble unusola rimarko pri la aranĝo de la volumo: la enhavtabelo nekronologia malhelpas trarigardon laŭtempan, sekve estus pli oportune kontentigi la alian principon povi trovi la opajn verkistojn, tiel, ke la paĝnumeroj aperu en la leksikona parto ĉe la koncerna nomo.

Bedaŭrinde ni esperantistoj grandparte vivas en la mondo de esperoj. Do, mi esprimas nur esperojn, ke tiun volumon sekvos naciaj prilaboroj, en la opaj landoj aperos antologioj de la Esperantlingvaj verkistoj enlandaj, aperos antologio de la originalaj Esperantaj noveloj, eseoj kaj kritikaĵoj, eĉ komenciĝos fluo de niaj valoraj romanoj, kaj ekestos, post la inventaroj, analizaj kaj sintezaj verkoj, por ke povu poste rekomenciĝi la sekva turno de la evoluspiralo, sed jam sur pli alta nivelo. Gratulojn kaj sukcesojn ni deziru en la nomo de ĉiuj esperantistoj al tiuj, kiuj entreprenas tiun mamutan laboron.

Imre Szabó

La pioniraj jaroj

L. Kökény — V. Bleier: Enciklopedio de Esperanto. Tria eldono. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1986. 600 p. 24x17 cm. Prezo: 45,00 ned.gld.

Tiu, kiu volas posedi fidindan konsultlibron pri la historio de la disvolviĝo de la Esperanta lingvo, literaturo kaj movado inter 1887 kaj 1932, ne povas fari pli bone ol aĉeti la Enciklopedion de Esperanto.

Per nova faksimila eldono Hungara Esperanto-Asocio faras bonan servon al la esperantistaro. Antaŭ ol Esperanto fariĝos 100-jara, ni denove disponas pri detala informlibro pri la unuaj 45 jaroj de ĝia vivo. Kaj eĉ en pli oportuna formato, ĉar ĉiuj 600 paĝoj de la duvoluma unua eldono nun troviĝas en unu volumo kaj la bindaĵo de tiu unu volumo estas pli fortika ol tiuj de la originalaj du volumoj.

Grandan parton de la Enciklopedio okupas tri temoj: biografioj de ĉ.1500 homoj, kiuj faris memorindaĵojn por Esperanto, detaloj pri ĉ. 450 gravaj libroj, gazetoj kaj revuoj, kaj historioj de la disvastiĝo de Esperanto en la plej gravaj landoj. Tiu de Hungario, ekzemple, okupas pli ol 6 paĝojn.

Multaj paĝoj estas dediĉitaj al la vivo kaj verkoj de Zamenhof kaj al liaj familianoj.

Ĉio estas facile konsultebla per alfabeta listo de la familiaj nomoj de la homoj, la titoloj de la eldonaĵoj, kaj la nomoj de la landoj.

Sed pli multo troviĝas en la verko. Ne nur detaloj pri eldonejoj kaj presejoj, kie naskiĝis nia literaturo, kaj bibliotekoj, kiuj donas al ĝi daŭran hejmon, sed ankaŭ informo pri la strukturo de Esperanto, ĝia disvastigo kaj ĝia uzado por komercaj, radioprogramaj, turismaj, sciencaj, politikaj, religiaj kaj aliaj celoj, inkluzive de filatelo, korespondado kaj sporto.

Aliaj memorindaj artikoloj estas tiuj pri instrumetodoj, stenografiaj sistemoj uzitaj de esperantistoj, internaciaj geedziĝoj, blindaj esperantistoj, malsukcesintaj internacilingvaj projektoj, jarlibroj, adresaroj, kongresoj, grupoj, insignoj kaj aliaj informiloj pri nia lingvo. Specialan atenton ricevis la marksismaj vidpunktoj pri universala kaj internacia lingvo, la laborista movado, la opinioj de la Komunista Internacio pri Esperanto, la proleta esperantistaro kaj revoluciaj Esperanto-verkistoj.

La ĉirkaŭ 25 tre interesaj prilingvaj artikoloj verkitaj de Kalocsay estas ankoraŭ aktualaj, ekzemple, pri la uzo de la artikolo „la", la prepozicio „da", duoblaj literoj, neologismoj, pasivaj participoj, neoficialaj sufiksoj, verboj transiraj kaj netransiraj, elparolo, rimo, ritmo, la principo de neceso kaj sufiĉo, vortfarado, vortordo.

Kalocsay estis nur unu el pli ol cent konataj esperantistoj, kiuj kunlaboris aŭ verkis artikolojn por la Enciklopedio. Ĉi tie mi menciu nur Julion Baghy, Pál Balkányi, Miklós Bánó, Imre Baranyai, Ferenc Csutak, László Halka, György Karczag, József Mihalik, Ferenc Szilágyi, József Takács kaj Lajos Tárkony.

Ĉio estas verkita en perfekta simpla stilo, kiu vekas la intereson de la leganto kaj tenas ĝin. Kelkaj nacilingvaj enciklopedioj estas nur kolektoj de malnovaj sekaj ostoj, sed la Enciklopedio de Esperanto vivas kaj ĝi vigligas la leganton. Li povas nur admiri kaj firme decidi daŭrigi la kuraĝajn penegojn de niaj pioniroj.

Edward *OCKEY*

GAJA PAĜO

ĈIU DEVAS KOMENCI

— Kial vi fuĝis el la operaciejo lastmomente? — kriis rabie la ĉefkuracisto al la paciento.

— Ĉar la flegistino diris: „Ne paniku! Fortranĉi apendicon estas ja tre simpla operacio."

— Nu, ŝi ja pravis! Ĉu vi tamen timis?

— Jes, ĉar ŝi tion diris ne al mi, sed al la juna kirurgo!

ANKAŬ LI

— Kiel plaĉas al vi tiu mia novkonstruita maŝino — demandis inĝeniero sian kolegon.

— Vere rimarkinda ludilo! Kaj diru, al kiu muzeo vi dediĉis ĝin?

FANFARONO

La maljuna grafo fieras en la eleganta societo pri siaj glorriĉaj prauloj. Por haltigi tiun tedadon iu ironias:

— Baldaŭ vi retroiros ĝis Noa, en kies arkeo jam krozadis via prapatro, ĉu?

— Ho, ili tutcerte ne kunkrozadis — protestas la grafo. — Tiam mia familio jam havis propran jaĥton!

TAKSI-TAKSADO

La taksimetro montras jam altan sumon, kiam la pasaĝerino konfesas, ke ŝi ne trovas sian monujon... La ŝoforo alrigardas la ĉarmulinon, poste ekas:

— Nu, se vi volas, ni interkonsentos, ĉu ne? Do, deprenu rapide vian kalsoneton...

— Volonte — ŝi eligas — sed ĉu ĝi kontentigos vin? Ĝi kostis ja nur 50 forintojn!

SEN ŜI?

Pasis jam dekjaroj depost kiam ili vivas kiel geedzoj. Foje ŝi trude sentis la emon krude demandi lin pri la vivgrava filozofia afero:

— Diru al mi jam, mia karega, kia estus via vivo sen mi?

— Mia vivo, ĉu? Pli malkara, mia trezoro, certe pli malkara...

TRAFA EKSKUZO?

— Vi ĉiam maltrafas! — grumblas la ĉefĉasisto al la novulo.

— Tute ne gravas — opinias la freŝbakita ĉasisto —, almenaŭ la leporoj vidas mian bonan intencon!

KIE LA ZORGOJ?

La direktoro elokvente parolas dum la entreprena kunveno:

— Pasintjare ni staris ankoraŭ antaŭ abismo — sed ĉi-jare ni faris grandan paŝon antaŭen...

TUTNOVAJ ZORGOJ?

Post la unua lerneja tago la patrino demandas sian etulon:

— Ho, mia karuleto, diru jam al panjo, ĉu ĉio iris glate hodiaŭ?

— Tute ne — li respondas iom maltrankvile. — Imagu, morgaŭ mi devos ripete iri tien...

PACAJ KOLOROJ?

— Oni diras, ke blondaj virinoj estas pli malkverelaj ol la nigraharaj. Ĉu tio estas vera?

— Ankaŭ mi ne scias. La hararo de mia edzino estis jen blonda, jen nigra, tamen mi rimarkis nenian diferencon!

ENVIINDA TELEKOMUNIKADO

Du kruckavaliroj interparolas pri la mizeraj cirkonstancoj.

— Kiel eblas, ke dum ni daŭre malsatas, nia kunkavaliro Teobaldo kontinue dikiĝas?

— Ja, ĉar li ĉiutage ricevas leteron de sia fidelega edzino.

— Ĉu do lin dikigas la amo? Grandioze!

— Tute ne! Sed sciu, ke leginte la leteron, Teobaldo bakas la alvenintan kolombon, kaj varme pensante pri la edzineto li manĝas leterportinton...

Ervin *Fenyvesi*

La velo



Ni citas la lastan strofon el poemo de Lermontov (tr.: Gusev):

„ Ĝin korvas blua ond' ĉiela..." - la daŭrigon vi trovos en linioj H.2., V.1., V.2. kaj H.7. (ensendendaj linioj). Inter la solvintoj ni lotumos premiojn. Limdato : du monatoj post la apero.

HORIZONTALE: 15. Revolucia E-eldonejo (inter la mondmilitoj), 16. Rifuĝejo (R), 17. Antaŭa parto de taĉmento, 18. Bor-aparato, 19. Aron da soldatoj, 21. Blua koloro de la ĉielo(R), 22. Prefero, 23. Fama Pariza firmao pri virina modo, 24. Reen: mara fiŝo, 26. Provizi per bataliloj (R), 27. Montra-pronomo, 28. Surkapigas signon de reĝa povo, 30. Mediteranea lando, 31. Sufikso por frakciaj numeraloj, 32. Grasa parto de lakto (R), 33. Reen: liptuŝe, 35. Substantivo de nepreciza sufikso, 36. Interjekcio, 37. Aktoris, 38. Peceto el griza malmola metalo, 39. Demanda adverbo, 40. Turka gren', 42. Granda sporta konkurso, 43.serio da lecionoj (R), 44. Interno de korpo(!), 45. Japanan imperiestron, 46. Mara rabist', 48. H. 31. - inverse, 49. Emajlo, glazuro (R), 50. Alĝeria havenurb', 51. Akompanu, 52. Koncerna komencon de kurado, 55. Ano de norda soveta respubliko, 57. Reen: refleksiva pronomo, 58. Disrompi terbulojn (R), 59. Kun to: la sesa tago, 61. Klopodi, 62. Komuna manĝ' ĉe la unuaj kristanoj, 63. Rivero, en Germania industria teritorio, 65. Sankta libro de Islamanoj, 66. Koloro de Esperantistoj, 67. Blua supra spaco, 69. Tuto de l' popolo (R), 70. Luli, ŝanceli (R), 71. Heroino de Ibsendramo.

VERTIKALE: 3. Loĝanto de soveta respubliko, 4. Kutima konstrumaterialo, 5. Gelateneca substanco, koloida, 6. Instrumento, 7. Reen: numeralo, 8. Komercaĵon, 9. Rapidfermilo, 10. Miksi metalojn, 11. Onomatopeo, imitanta krion de bebo, 13. La unua virino, 13. Para osto de la nazo, 14. Ligi per fadeno, 19. Tia kvanto, 20. Vivejo de ĉiuj homoj kaj bestoj, 23. Instrui beston (R), 25. Murrompilo, 28. Daŋĝera faz', 29. Ekzemple ĉimpanzon, 32. Speco de broĉo (R), 33. Ne ĝuste, 34. Grajno de iaj fruktoj (R), 36. Reen: ... de Janeiro, 38. Franda bakaĵo, 39. Rapide sin movi, 41. Kolekto, 42. Regula son' de horloĝo, 43. Arto de kinematografio, 45. Dio de la milito (R), 46. Kondamni pro kulpo, 47. Filino de Minoo, fama pro „faden"' 49. Parol' al Dio, kun artikolo, 51. Scio pri io, 53. Faris kaveton en ion, 54. Antaŭmendi Hungaran Vivon, 56. Parto de ilo (R), 57. Kamparo (R), 60. Loĝanto de iuj islamaj landoj (R), 62. Reen: grasa, 64. Reen: V.6., 66. Senutila (R), 68. Valora metal', 70. Interjekcio esprimanta surprizon.

I.Z.

Solvoj de la krucenigmo en la n-ro 1986/2:

Ĝoju trista menso! Tuta mondo novos
Antaŭ ol jarcento sian finon trovos.
(J. Batsányi — Trad. J. Varga)

Premion gajnis per lotumado: Zdislaw DZIUBINSKI, Zamoŝĉ, PL; KOVÁCS Ferenc, Sátoraljaújhely, H; Miklós F. SZAKOS, Magdeburg, GDR.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Márton Fejes

URBORANDA NOKTO
de
Attila József

Sepdek elektitajn poemojn de Attila József enhavas tiu ĉi poemaro, multajn ankoraŭ ne publikigitajn tradukojn, kelkajn eĉ en pluraj variantoj.

1. Kiu poemo aperis en kvin variantoj?
2. Kiu tradukis la poemon „Saluto al Thomas Mann"?
3. Kiu poemo komenciĝas per verso: „Mi sidis sur plej suba ŝton' de l' bordo..."

LIMDATO: du monatoj post la apero.

Solvo de la demandoj en la n-ro 1986/2:

1. La nomo de la filino estas Maria.
2. La kaŝvorto de la edziĝ-anonco: Aŭtuna sunbrilo.
3. La morton de la patro kaŭzis la defalinta portreto de la unua edzino.

Premion gajnis per lotumado: A. GAEV, Asenovgrad, BG; Pierre LANDARD, Veynes, F. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

La verkoj de la sekvaj ekzamenoj:
En la n-ro 1987/1: J. Baghy: Hura! 1987/2: I. GÁLL: Obsedita de l' Suno 1987/3: Lorjak: Mariagnes 1987/4: Baza Legolibro por Komencantoj

DESEGNAĴOJ DE JENŐ DALLOS



Kontakto



Dialekto

Pesilo



Bru-damaĝo



Maŝina epoko



Semajnfina ekskurso



FARIĜU ANKAŬ VI
NIA KOMERCA PARTNERO!



La plej granda komerca entrepreno de Transdanubio

NIA VARLISTO:

— Dommastrumaj kaj kuirejaj aparatoj
— Laboriloj, malgrandaj maŝinoj
— Ĝardenaj aparatoj
— Hejtaj kaj kuiraj aparatoj
— Artikoloj por instalado de banĉambroj
— Aparatoj de telekomunikado
— Elektraj dommastrumaj maŝinoj
— Bicikloj, motocikloj

FERROVILL

Komerca Entrepreno
H-9021 GYŐR
Gorkij u. 21.
Telefono: 16-022
Telekso: 024241

Ferio+Hungario=
HungarHotels

HungarHotels en Budapesto: Hotel Duna Interconinental*****
Hotel Béke** Hotel Flamenco**** Forum Hotel Budapest**** Hotel Astoria*** Hotel Budapest*****
Grand Hotel Hungaria* Hotel Erzsébet*** Hotel Expo*** Hotel Stadion*****
Hotel Vörös Csillag**
Novaj en 1987: en München: Hotel Budapest***

1987 FEB 10